


EL POPOLA ĈINIO

11
1973





精心培育

九七年 渝茶

Laboristaj, Kamparanaj kaj Soldataj Studentoj Antaŭenmarŝas en Socialismaj Universitatoj

Profesoro Vu Ĝacun de la okcidentlingva fakultato de la Pekina
Universitato helpas la studentojn en ilia postkursa lernado.






Haŭ Guoŝu (*la dua de dekstre*), laboristo de la Pekina Unua Konstrua Kompanio, laboras nun kiel laboristo-instruisto de la konstrua fakultato de Kinghua-universitato. Li direktas gestudentojn en masonado.



Laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj de la Pekina Universitato legas en la biblioteko verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj de Prezidanto Maŭ.


Gaŭ Ginhiu (*meze*), laboristo de la Pekina Fabriko de Neferaj Metalaĵoj, nun estas laboristo-instruisto de la fakultato de industria aŭtomatigo de Kinghua-universitato. Li direktas studentojn ĉijare diplomigontajn en sinteza trejnado.





Laŭ la bezono de fabrikoj kaj minejoj, la Siĉuan-a Mina Instituto stariĝis 22 kursojn. Studentoj de la kurso por kontistoj estas en studado.


He Zengŝun (*la unua de maldekstre*), studento de la geologia fakultato de la Siĉuan-a Mina Instituto kaj kompartiano, estas drilisto kun 12-jara praktika sperto.



Studentoj de Tonggi-universitato de Ŝanhajo aŭskultas lecion de laboristo-teknikisto pri mezurado sur la konstruejo.



laboratorio de materiala mekaniko, studentoj Tonggi-universitato de Ŝanhajo mezuras la mekanajn ecojn de kunagado de fero kaj betono.




Amatoraj artistinoj de la Pekina Universitato provludas dancon.





Studentoj de la Centra Instituto por Naciecoj interŝanĝas komprenon pri la lecionoj.



Sun Gujling (la unua de maldekstre) kaj Duan Kajhiaŭ (la dua de maldekstre), studentoj de la dua klaso de la medicina fakultato de la Pekina Medicina Instituto, antaŭe estis kamparanaj kuracistoj. Ili faras kune kun instruistoj operacion al malsupra membro de paciento en la Unua Hospitalo sub la Pekina Medicina Instituto.

Kombino de Teorio kun Praktiko en Instruado

TONGGI-UNIVERSITATO de Ŝanhajo estas politekniko kun civila inĝenierado kaj arkitekturo kiel la ĉefa fako. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ pri **“unuigo de teorio kun praktiko”**, la instruistoj kaj studentoj de la fakultatoj de arkitekturo kaj civila inĝenierado, en kunlaboro de projektaj kaj konstruaj unuoj de civila inĝenierado, ekde oktobro de 1969 faris provan instruadon kunligantan tipan konstruadon sub la gvido de sama partia komitato kaj akiris relative bonan efikon dum la lastaj jaroj.

Laŭ la instrua metodo oni elektis kelkajn konstruajn projektojn konformajn al la faka bezono de instruado kaj la principo de instruado de baza scio al pli alta, de simpla al kompleksa, direktas la studentojn partopreni en projektado kaj inĝeniera praktiko laŭ la malsamaj stadioj de la instruado. Tiel oni organisme kombinis la praktikon kaj teorion por plenumi la tutan instruan procezon de praktiko al kono, de individuo al ĝeneralo kaj de konkreto al abstrakto. Kaj samtempe kun tio oni inspiris la studentojn konscience lerni de la laborista klaso kaj kulturis ilin en homojn tutkore kaj tutanime servantajn al la popolo kaj pene luktantajn en malfaciloj.


En julio de 1969, la lernejo prove fondis fakon de domkonstruo. Kaj en decembro de 1970 tiu fako refoje akceptis 215 laboristajn, kamparanajn kaj soldatajn studentojn. Nelonge post tio la lernejo organizis ilin partopreni en praktika konstruado. El la tuta procezo de la komenco ĝis la fino de la konstruado, la studentoj konis kiel konstruigis la domo. Kaj en kaj post la konstruado, kombinante kun la praktiko, la instruistoj lekciis pri la fundamen-

taj scioj de domkonstruado kiaj kono de desegnoj, desegnado, mezurado, konstruaj materialoj, konstruaj strukturoj kaj konstruado. Krom tio, la instruistoj ankaŭ donis al la studentoj kursojn de fundamentaj teorioj kiaj matematiko, mekaniko kaj kalkulo de projekto por prepari kondiĉojn por partopreno de la studentoj en projektado.

Poste la studentoj komencis projektadon de sia unua tipa konstruaĵo. Oni ĝenerale elektas relative simplan civilan konstruaĵon kia loĝdomo. Per la kolektiva saĝo, la studentoj prezentis ĝeneralan projekton kaj faris la diverspartajn projektojn sub la direktado de instruistoj.

En la procezo de projektado, la instruistoj instruis teorion laŭplane, por ke la studentoj mastru la kalkulan metodon de projekto de tiuspeca domo. Post tio, la instruistoj faris relative koncentran teoriant instruadon, por ke la studentoj induktu multajn perceptajn konojn akiritajn en la komenca konstruado kaj la projektado, kaj sublimu ilin en teorion. Kaj la instruistoj kaj studentoj tiam ankaŭ partoprenis en partoj de tiu konstruado, aŭskultis la opiniojn de laboristoj kaj teknikistoj pri la projekto por kontroli kaj revizii ĝin en konstruado.

Post relative sistema instruado de teorio, la studentoj faris projekton de la dua tipa konstruaĵo — domo kun komponita strukturo. La tuta projektado de tiu ĉi konstruaĵo estis sendepende plenumita de la studentoj. Ekzemple, la studenta grupo de veteranaj laboristoj de la triajara klaso laborintaj meznombro pli ol dek jarojn projektis gastejon de fabriko. En la projektado de tiu tipa konstruaĵo, oni devis uzi la antaŭe lernitajn matematikon kaj mekanikon por kalkulado de strukturo, mekanika



En klasĉambro studento donas sian opinionon pri la projekto de truso.

analizado kaj ĝenerala takso. Dank' al tio la studentoj povis pli bone mastri antaŭe lernitan teorion kiun ili ankoraŭ ne povis bone uzi.

La tria tipa konstruaĵo projektenda laŭ la bezono de la instruado estis industria fabriklomo. Iu grupo de la triajara klaso elektis muldejon kun 900 kvadrataj metroj kiel sian temon. Tiam la instruado postulis ke la studentoj mastri la projektadon pri unuetaĝa fabriklomo, kalkulon pri ĝiaj elementoj kaj scion pri konstruado. La instruistoj profunde lektiis pri la principoj de projekto kaj kalkulo renkontitaj en la projektado de fabriklomo, por ke la studentoj plialtigu kaj pliprofundigu la teoriajn sciigojn akiritajn en la projektado de la antaŭaj du tipaj konstruaĵoj surbaze de la nova praktiko.

En la lasta lernoperiodo, la studentoj faris ankaŭ praktikon pri konstrua administrado kaj partoprenis en certa scienca esplora laboro.

Aplikante tian instruan metodon, oni devas elekti bonan tipon, sed la tipeco de konstruaĵo ĉiam restas relativa. Se iu tipa konstruaĵo ne povis kontentigi la postulon de perioda instrua metodo, do la studentoj devis fari vizitadon, enketadon, partan projektadon kaj projektan ekzercon post la projektado de tipa konstruaĵo por perfektigi la lernadon.

Per triono de la tuta lernoperiodo, la studentoj de tiu fako partoprenis en projektado kaj konstrua praktikado de tipaj konstruaĵoj.

La universitato irigis la instruistojn kaj studentojn el la lernejo, por ke la instruistoj donu lecionojn al la studentoj en praktika projektado, ili rekte kontakti kun la socio kaj lerni de la laboristaj amasoj. Antaŭ projektado de ĉiu tipa konstruaĵo, la instruistoj kaj studentoj ĉiam faris vastan enketadon al samspecaj konstruaĵoj por koni la postulojn al la projekto. Kaj post prezento de la projekta plano, ili reiris al la amasoj por peti iliajn opiniojn pri la projekto. Sur konstruejo, la instruistoj kaj studentoj laboris kaj diskutis pri la projekto kune kun la laboristoj. La lernejo ankoraŭ petis spertoriĉajn laboristojn de konstruaj unuoj labori kiel siaj instruistoj, tiel ke la instruistoj kaj studentoj vivas kune kun la laboristaj instruistoj. Dank' al tio, ili povas lerni ne nur enketan esploran kaj labormetodon de amasa linio, sed ankaŭ la noblan senegoismon kaj la spiriton de penema konstruado de la laboristoj.

En projektado de fabriklomo, iu studento strebis nur al beleco kaj por teni egalan distancon de la pluvtuboj sur la ekstera muro, li projektis unu zigzagan tubon sur la angulo de la ilĉambro. Vidinte tion, laboristoj diris al li: "Se vi iom ŝanĝus la pozicion de tiu ĉi tubo, ĝi povus esti rekta, kaj per tio ŝpariĝus kaj materialo kaj laborforto." Poste la studento diris profunde kortuŝite: "El tio mi ricevis edukadon pri la du malsamaj specoj de pensoj de projekto."

Tiu ĉi instrua metodo kulturis la studentojn tiel ke ili ne apartiĝas de amasoj, de produkto kaj de praktiko, altigis sian politikan konscion sub la edukado de laborista klaso, faras projektadon por servi al la popolo kaj akiris kulturajn kaj sciencajn sciojn pli riĉajn ol en la lernolibroj.

En la instruado per projektado de tipaj konstruaĵoj, tiu ĉi fako ankoraŭ uzis la plejparton de la lernotempo por fari instruadon pri bazaj scioj kaj faka teorio. Oni forlasis la pasintan metodon de nura instruado en la klasĉambro sen praktiko, kaj nun la instruistoj lektiis pri la abstrakta teorio en la konkreta konstrua praktiko. La instruistoj faris konvenan instruadon de teorio antaŭ, dum kaj post projektado de tipaj konstruaĵoj, tiel ke la teoria kurso fariĝas interesa kaj vivcea.


Antaŭ projektado, la instruistoj lektiis nur pri necesaj scioj por la projektado. La enhavo instruita dum la projektado ĝenerale estas malfacile eksplikebla sen praktiko. Ekzemple, lektiante pri ŝarĝokalkulo, antaŭe la instruistoj faris sur la nigra tabulo multajn desegnojn, sed la studentoj ankoraŭ ne povis kompreni. Kaj la nuna instruado ebligis

al la studentoj facile kompreni ŝarĝokalkulon en kunligo de la samtipaj elementoj projektotaj.

Laŭ la principo ke kono devenas de praktiko, la instruistoj instruas iujn teoriajn kursojn laŭplane post la projektado. Se la studentoj renkontis antaŭe nelernitan kalkulan metodon dum la projektado, la instruistoj unue lektiis pri kalkula formulo kaj detala ekspliko pri ĝia deveno estas farata nur post la fino de projektado. Sur la bazo de konkreta praktiko kaj post la ripeta uzado de la formulo en la projektado, la studentoj povas pli facile kompreni la postan lecion kaj tio ankaŭ povas altigi ilian kapablon por solvado de praktikaj problemoj.

Ekzemple, la kalkulado de kolono antaŭ projektado estas ĝenerale farata per kelkaj partoj kiaj supra kolono, malsupra kolono k.a., kaj la studentoj povis kalkuli la grandecon de ĝia sekco kaj la dispozicion de armaturo laŭ la supozitaj prefortoj, kaj neniel povis sinteze konsideri pri la interrilato inter la elementoj kaj la deveno, transpaso kaj kombiniĝo de la fortoj, kaj tiam la lernita scio estis multe nekomplekta. Dum projektado de iu laborejo

Studentoj de la grupo el veteranaj laboristoj diskutas pri la artika modelo.






Kun la tipa konstruaĵo, studentoj, laboristoj kaj teknikistoj kune faras diskuton en la konstruejo.

la studentoj de la kvara kaj kvina grupoj de la triajara klaso de domkonstrua fako renkontis kalkulan problemon de ekscentraj kolonoj, kiu estas relative kompleksa en la kalkula teorio de ferbetonaj elementoj. La instruistoj unue kondukis la studentojn fari enketadon en fabriko, por ke ili vidu ke tian kolonon premas ne nur la forto de tegmento, sed ankaŭ la forto donita de pontargano dum ĝia irado, kaj la forto donita de vento al la muro, kaj krome, la ekscentra kunpremo estas jen granda jen malgranda, kaj venas jen de maldekstre, jen de dekstre, unuvorte, la afero estis ne tielsimpla kiel imagite. Kunligante la praktikon, la studentoj analizis la reciprokan efikon de diversaj fortoj kaj ĝuste faris la kalkuladon. Kaj iuj studentoj povis eĉ surskribi la kalkulan formulon sen lerno-libro en la mano.

La lekcio pri projekto kaj kalkulo de tegmenta truso estis farita post la projektado. Antaŭ la lekcio, la instruisto donis al la studentoj de la triajara klaso kelkajn problemojn por ke ili poste pripensu. En la leciona horo, la instruisto lasis studentojn mem lekcii. Pli ol 20 studentoj konkure suriris sur la podion. Per la lernitaj multaj kalkulaj metodoj uzitaj en la antaŭaj projektadoj de tipaj konstruaĵoj, ili lerte faris analizon de la premo de tegmenta

truso. Ĉi Jongfa, laboristo-studento veninta de Hingiang, prezentis kalkulan metodon, kiam la ŝarĝo sur la tegmenta plato ne efikas al la artikoj de tegmenta truso, oni povas kalkuli la ŝarĝon simple laŭ la efiko al la artikoj. Per granda nombro da donitaĵoj, li pruvis ke la simpligo kaŭzis tre malgrandan eraron tute permesatan. Tiun ĉi kalkulan metodon ne konsideris eĉ la instruistoj, kaj ĝi multe malpliigis la kalkulan laborkvanton kaj havas ankaŭ certan signifon en praktika uzado. En lekcio pri la interrilato inter la alteco de tegmenta truso kaj la premo en la kordoj, iu studento de la kvara grupo eksplikis per formulo ke ju pli alta estas la tegmenta truso, des pli malgranda la premo en la kordoj kaj des pli ekonomia la projektado. Ankaŭ tio superis la postulon de matematiko. La abstrakta kaj seka leciono de kalkula teorio estis donita de




pli ol 20 studentoj vivece kaj penetrive. La instruistoj ĝoje diris: “Sen projektado de kelkaj tipaj konstruaĵoj, oni ne povus akiri tiom bonan efikon en teoria kurso.”

En la lastaj jaroj, la instruistoj de tiu ĉi fako ankoraŭ kompilis lernolibrojn kiaj “Fundamenta Scio pri Domkonstruado”, “Kalkulo pri Elementoj de Domstrukturo” k.a. laŭ la ordo de simpleco al komplekseco de la tipaj konstruaĵoj. Tiuj lernolibroj estas tute malsamaj ol la antaŭaj. Ekzemple, la “Projekto kaj Kalkulo de Civilaj Domoj”, kunligante la 6-7 antaŭe izolitajn kursojn kiaj arkitekturo, strukturo, mekaniko, konstruado k.a., sinteze en unu libron. La novaj lernolibroj plifortigis la internan rilaton inter diversaj fakaj kursoj kaj ankaŭ atentis la necesan sistemecon de ili, tiel ke la lernoobjektoj estas simpligitaj, la lernotempo mallongigita, kaj la studentoj povas ellerni pli multajn utilajn sciojn per relative mallonga tempo.

La instruado en interligo kun tipaj konstruaĵoj estas nova afero en la eduka revolucio, kiu estis iam atakata de la malnova instrua penso. La partia komitato kaj diversnivela partiaj organizoj de Tonggi-universitato firme praktikas la proletan edukan linion de Prezidanto Maŭ kaj zorgeme protektas tiun ĉi novan aferon, por ke ĝi senĉese disvolviĝu kaj perfektigiu. Nun, ĝojindaj fruktoj estas jam akiritaj.

Hie Longpo, studento de la triajara klaso, estis antaŭe metalurgiisto de la Gilin-a Feraloĵa Fabriko.

Unu el la tipaj konstruaĵoj projektitaj de la studentoj de la unujara klaso



En la somerferioj de 1972 kiam li revenis al la fabriko por partopreni en laboro, la fabriko intencis grandigi la laborejon de elektra forno, kaj mankis al ĝi teknikisto de civila inĝenierado. Li meminciate prenis sur sin la projektan taskon. Per la scioj akiritaj post projektado de la du tipaj konstruaĵoj en u u kaj duona jaroj en la lernejo kaj post plena enketado kaj esplorado, li sendepende faris la projektadon kaj desegnadon en 20 tagoj. Nun la konstruaĵo estas jam finita kaj montriĝis taŭga en uzado. En la somerferioj de la kuranta jaro, 32 laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj de la triajara klaso sendepende plenumis projektajn taskojn de 8 konstruaĵoj kun 50,000 kvadrataj metroj por kvar konstruaj unuoj en nur iom pli ol 20 tagoj. En la pasintaj pli ol du jaroj, 215 studentoj de tiu klaso projektis industriajn kaj civilajn konstruaĵojn kun sume 52,000 kvadrataj metroj kombinate kun lernado, kaj inter ili tiuj de 30,000 kvadrataj metroj jam konstruiĝis. La studentoj diris: “Kvankam ni lernis nur du kaj duonan jarojn kaj ankoraŭ ne diplomiĝis, tamen, ni jam povas sendepende fari projektadon de ordinaraj civilaj kaj industriaj konstruaĵoj.”

Nun la instruistoj kaj studentoj de la domkonstrua fakultato de Tonggi-universitato ankoraŭ faras novan klopodon por perfektigi la metodon de instruado en kunligo kun projektado de tipaj konstruaĵoj.

Studentoj interŝanĝas opiniojn pri siaj projektoj de iu konstruaĵo.



Ili Progresas kaj Politike kaj Teknike

STRIKTE sin ligante kun la klasa batalo, produktata batalo kaj scienca eksperimentado, la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj de la Ŝenjang-a Medicina Instituto diligente lernas Marksismon-Leninismon kaj la verkojn de Prezidanto Maŭ, aktive studas la medicinan teknikon kaj rapide progresas sur la vojo esti ruĝa en politiko kaj eksperta en profesio.

NOVA GENERACIO

Antaŭe la lernoperiodo de la Ŝenjang-a Medicina Instituto estis kvin-jara, sed post la kultura revolucio fariĝis tri-jara. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ Zedong “**Studentoj devas esti selektataj el la laboristoj kaj kamparanoj, kiuj havas praktikan sperton**”, la instituto varbis unuafoje en la jaro 1970

461 studentojn el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ili estas meznombro 20-jaraj, ricevis 8-jaran edukadon, laboris kiel kamparanaj kuracistoj, flegistinoj kaj sanitaristoj kun minimume dujara laborsperto.

Deveninte de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, la studentoj havas klaran celon lerni por la revolucio. Post vizito de la instituto, ili serioze studis la verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj de Prezidanto Maŭ, persistis ĉe la ĝusta politika direkto kaj klopodis por fariĝi medicinaj laborantoj kompetentaj kaj en politiko kaj en tekniko. Dum la lernado, ili aktive partoprenis en klasa batalo kaj faris revolucion en lernobjektoj kaj instrua metodo. Kun profunda amo al la laboranta popolo, ili provis akupunkturon kaj medikamentojn per si mem por trovi novan terapion, kaj por urĝe savi la vivon de mal-



Post reformo de la malnova instrua metodo la elektrokardiografio estas pli facile lernebla ol antaŭe.

sanuloj, ili senhezite oferis sian sangon. En ferioj, ili revenis al siaj fabrikoj kaj vilaĝoj, partoprenis en produkta laboro kaj vizitis najbarojn por doni kuracadon al ili, tiel ke ili trovis bonvenigon ĉe la amasoj.


Sed, antaŭ la kultura revolucio, malhelpate de la reviziisma eduka linio, tiu ĉi lernejo deviigis nelmultajn studentojn de la proleta politiko. Tuj studentoj ŝanceliĝis en klasbatalo; aliaj infektitaj de burĝa kuraca penso klopodis por lerni teknikon sen zorgo pri la doloro de pacientoj; kaj triaj venenitaj de la burĝa penso "esti famulo aŭ specialisto" volis labori en granda urbo kaj granda hospitalo post diplomiĝo, sed ne en baza unuo kaj kamparo. Iliaj pensoj tute ne akordiĝas kun tiuj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Retrorigardante la pasintecon kaj vidante la novan generacion en sana kreskado, la instruistoj profunde komprenis ke tio rezultas el plenumo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

TEORIO EN INTERLIGO KUN PRAKTIKO

En la eduka revolucio, la instituto kritikis la pasintan instruon metodon apartigi teorion de praktiko. Fininte en la instituto kurson de fundamenta teorio, la studentoj tuj iris al vilaĝoj, fabrikoj aŭ minejoj por lerni tie klinikon en praktiko, por pli-profundi la komprenon pri la lernita teorio. Post tio ili revenis al la dependa hospitalo de la instituto por resumi sian sperton kaj altiĝi sian teknikon. Dank' al tio rapide altiĝis la kapablo de la studentoj tiel en analizo kaj solvo de problemoj kiel en medicina tekniko.

En la lastaj tri jaroj, ili studis pli ol dek kursojn de fundamenta teorio kiaj "medicina kemio", "homa anatomio", "homa histologio", "homa fiziologio", "biokemio", "patologio", "mikrobiologio", "parazitologio", "farmacio" k. a. La plejmulto el la studentoj kapablas bone ekspliki per la lernita teorio la aperon kaj evoluadon de malsanoj en iliaj kaŭzo, patologio kaj biokemio de organismo kaj per tio direkti la klinikan praktikadon.

Ĉeng Jongĵen kaj aliaj studentoj, kiuj faris praktikon en la Hifeng-a instrua bazo, renkontis pacienton longe suferantan de kancero kun kompleksa kazo. Laŭ la ekzameno de malsana historio kaj fekaĵo, la malsano estis obstrukca iktero, sed post kemia analizo de sango, oni trovis aspekton de hepatĉela iktero. Laŭ la biokemia principo de gala metabolo, ili faris analizon kaj diagnozis ke la obstrukca iktero estas primara dum la hepatĉela



Studentoj operacias malsanulon en kamparana domo.

malordo estas sekundara, tial oni devas apliki al ĝi operacion. La rezulto pruvis ilian diagnozon ĝusta.

La studentoj bone komprenas ne nur ĝeneralan fundamentan teorion sed ankaŭ malfacilan tamen nepre posedendan teorian scion. Ekzemple elektrokardiografio estis rigardata kiel malfacile lernebla kaj komprenebla en la pasinteco, tamen nun multaj studentoj jam povas fari analizon de kardiogramoj de tipa kardiinfarkto kaj aliaj kormalsanoj en kliniko kaj skribi ĝustan noton.

Iu maljuna kuracisto opiniis ke studentoj povos lerni pli multe en kvin jaroj ol en tri jaroj, kaj timis ke ili nebone posedos la fundamentan teorion. Foje li demandis al la studentoj: Kial okazis malleviĝo de sanga sukera nivelo al paciento post perfuzado de glukozo al li? Studentoj tuj respondis ke la perfuzo de glukozo incitis la pankreatajn insuletojn, pliigis la sekrecion de insulino kaj akcelis la transŝanĝiĝon de sanga sukero en glikogenon, kio kaŭzas momentan malleviĝon de sangsukera nivelo. La kuracisto ĝoje diris: "La laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj estas fortaj ne nur en praktika laboro sed ankaŭ en teoria scio."

EKZAMENO EKSTER LA KLASĈAMBRO

Praktiko estas la ĉefa metodo por ekzameni kiel la studentoj lernis. Ilia lernokvalito estas relative bona tiel en diagnozo kaj kuraco, precipe al akutaj malsanoj, kiel en posedo de fundamentaj teknikoj de operacio.

Post trijara lernado, la plejmulto el la studentoj povas prezenti ĝustajn diagnozajn kaj kuracajn opiniojn al pli ol cent ordinaraĵ malsanoj de interna medicino, kirurgio, ginekologio, pediatrio kaj otorinolaringologio. Multaj studentoj ankaŭ povas fari diagnozojn kaj elmeti siajn kuracajn opiniojn pri relative kompleksaj ofte renkontataj malsanoj. En sia klinika praktikado studento Fu Kingkjuan kapablis bone ekzameni la pacientojn de arteria sklerozo, koronaria kormalsano, cerba trombozo, bronkopneŭmonio, kaj prezenti ĝustajn diagnozajn kaj kuracajn opiniojn. Iu internomedicina profesoro diris: "Estas ja ne facile ekzameni kaj ĝuste diagnozi tiajn kompleksajn malsanojn!"

Nemalmultaj studentoj persistas ĉe la vidpunkto de dialektika materiismo kaj kapablas fari raciajn analizon kaj prognozon al netipaj kaj relative malfacilaj kazoj per la lernitaj teoriaj scioj. Iunokte en la Kingjuan-an instruan bazon venis malsanulo de akuta abdomenmalsano kun kompleksa kazo. Post informiĝo pri la malsana historio, ekzameno de la korpo kaj analizo de la kazo, kvin praktikantaj studentoj en kirurgio diagnozis la malsanon akuta krizo de kronika galcistita komplikaĵo kun galveziketa perforado, kaj operacio devis esti tuj farita al la paciento. Post ripeta diskutado, la kuracistoj opiniis kaj la operacio pruvis ke la analizo kaj diagnozo de la studentoj estis ĝustaj. La kuracistoj ilin laŭdis: "Tiuj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj havas certagradan teorion fundamentan scion kaj anakŭ kapablon por solvi realan problemon."

En kamparo kaj bazaj unuoj la studentoj ofte partoprenis kune kun la instruistoj en urĝa savado de pacientoj de seriozaj kazoj de toksado, traŭmato kaj infekto, kaj el tio komprenis ĝeneralan prin-

cipon de la savado. Ili ankaŭ havas certan kapablon por urĝe savi akutajn malsanulojn de traŭmato, ŝoko, sangosputo kaj komato kaŭzita de akuta kora malfortiĝo. Ĝu Hjuehi kaj aliaj studentoj, kiuj faris praktikon en Anŝan, trifoje renkontis pacientojn de serioza sangosputo. Dank' al rapida diagnozo kaj trovo de la pozicio de hemoragio, ili aplikis urĝan rimedon, tiel ke la pacientoj baldaŭ eldangiĝis.

Dank' al multa praktikado, la kapablo de tiuj studentoj en apliko de la fundamentaj teknikoj altiĝis rapide kaj superis tiun de la studentoj antaŭe kulturitaj de la instituto. Ili ĝenerale povas fari lumban kaj torakan punkcion, infuzon tra skalpaj vejnoj de infano kaj aliajn operaciojn. Nemalmultaj studentoj estas relative lertaj en operaciado, kaj faris respektive ablacion de stomako, supra parto de utero kaj tiroida kisto sub la direktado de instruistoj.

Krom tio, la studentoj ankaŭ posedas iom da tekniko de la ĉina medicino por malfortigi al pacientoj doloron. Ili ĝenerale kapablas fari akupunkturadon kaj aliajn novajn terapiojn en servado al pacientoj. Iu maljuna laboristo longtempe suferis de anurio kaj pusado kaŭzita de uretra infekto pro multfoja urinokonduko. Studento Ĝaŭ Faĝang kaj aliaj kuracaj laborantoj aplikis novan akupunkturadon kaj akiris rimarkindan efikon.

Post trijara diligenta lernado, la unua grupo da laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj de la Ŝenjang-a Medicina Instituto akiris ĝojindajn sukcesojn. Antaŭ nelonge ili finis sian studon en la instituto kaj nun, kun plena revolucia spirito kaj espero de la Partio kaj amasoj, ĝoje laboras sur nova posteno.



Studentoj lernas de maljuna kamparano scion pri drogherboj.

Tri Studentoj

EN la 21-a de julio, 1968, Prezidanto Maŭ Zedong donis gravan instrukcion pri la eduka laboro de nia lando: “**Proleta politiko devas esti metata en komandon kaj la vojo irita de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko en trejnado de selektitaj laboristoj en teknikajn laborantojn devas esti prenata. Studentoj devas esti selektataj el la laboristoj kaj kamparanoj, kiuj havas praktikan sperton, kaj ili devas reiri al produkta praktiko post kelkvara studo en lernejo.**” Tiu ĉi instrukcio de Prezidanto Maŭ montris la vojon al altaj lernejoj en ilia eduka revoluciado. Dum la lastaj kvin jaroj profunda ŝanĝo okazis al la altaj lernejoj kaj rapide kreskas miloj kaj miloj da novtipaj studentoj el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en la proleta politiko kaj faka scio.

Ĉi-sube ni prezentas fragmentojn el la vivo de tri studentoj.

Su Lide

La Fuĝoŭ-a Motora Fabriko produktas dizelojn, sed ĝia produktokvanto ne povis esti levita pro malalta aŭtomateco de la ekipaĵoj, tial la fabriko planis starigi produktan aŭtomatan linion. Tiam instruistoj kaj studentoj de la Fuĝoŭ-a Universitato faris en ĝi diploman projekton kaj prenis sur sin la taskon projekti kvin kunmetitajn ilmaŝinojn de iu laborsekcio. Nun la projekto jam estas plenumita kaj oni jam komencis ilin produkti. La fabriko alte taksis la rolon de la studentoj el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en la plenumo de tiu tasko. Inter ili troviĝis Su Lide, kiu estas aparte laŭdinda.

Li estas kompartiano kaj laboristo. Antaŭ la eniro en la universitaton li laboris jam 12 jarojn en iu maŝina fabriko. La kunmetita ilmaŝino, kiun li devos projekti, havas komplikan strukturon, altan precizecon kaj bonan aŭtomatecon. Ĝi

konsistas el pli ol 20 ĉefaj aksoj, kaj pli ol 20 ŝraŭbinoj kun malsamaj profundaj ŝraŭbkaneloj devas esti faritaj samtempe.

Akceptinte la taskon, li unue renkontis la malfacilon, ke li ne lernis pri tia ilmaŝino en la lernejo. Kion fari? Tiam venis al li bona ideo: iri inter la amasojn, sin ĵeti en produktan praktikon por fari enketadon. Laboristoj diris al li: “La kunmetita ilmaŝino uziĝos al la lasta procedo de la planita aŭtomata produkta linio de cilindrobloko. Antaŭe oni boris pli ol 20 truojn sur la cilindrobloko unu post alia per bormaŝino. La laboro estis peniga kaj malrapida. Se oni sukcesos fari tian ilmaŝinon, do la laborefiko povos sin levi je kelkdekoblo kaj la fabriko povos produkti pli multe da traktoroj por subteni agrikulturon.” La vortoj de la laboristoj lin multe stimulis. Li rapide kolektis diversajn materialojn por la projekto.

Tuj poste kamarado Su faris plian enketon kaj trovis, ke en la fabriko estas nombro da neuzataj malnovaj ekipaĵoj, kiujn oni povos utiligi en fabrikado de la nova ilmaŝino. Tiamaniere la bezonataj ŝtalajoj, laborfortoj kaj monrimedoj povos esti ŝparitaj, kaj la nova ilmaŝino povos pli frue ludi sian rolon, sed oni devos konsumi pli multe da tempo en projektado ol en tiu de novaj maŝinpartoj. La korpo, bazo kaj iuj partoj de la ilmaŝino estas malnovaj kaj nenormaj, tial oni devas mezuri kaj kalkuli aparte iliajn ŝarĝpovon kaj normon. Por bone perfektigi sian projekton, li ofte ne ripozis tagmeze, iam eĉ laboradis ĝis la 24-a horo nokte. Granda malfacilo aperis en projektado de la altpreciza temporegistrilo de la kunmetita ilmaŝino, ĉar ĝia kvalito rekte influos la funkciajn kapablecon de la tuta ilmaŝino. Li vaste petis opiniojn de instruistoj kaj laboristoj kaj konkeris la malfacilon per saĝo de amasoj. Post trimonata klopodado li sukcese plenumis la taskon sub la direktado kaj helpo de instruistoj, laboristoj kaj teknikistoj.

Ju Gujĵing


Ju Gujĵing estas studentino de la Ŝandong-a Agronomia Instituto. Dum la pasintaj du jaroj ŝi diligente lernis en la brutobreda kaj veterinara fako, malcedeme venkis multajn malfacilojn kaj atingis bonan sukceson en sia studado.

Antaŭe ŝi laboris kiel bredistino dek jarojn en produkta grupo. Ŝi humile lernis sperton de veteranaĵ bredistoj kaj zorgeme flegis brutojn, tiel ke la malgrasaj brutoj pli kaj pli fortiĝis, la multjare sterila bovino naskis idojn kaj la nombro de la brutaro kreskis 4-oble. Pro tiu atingo la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj elektis ŝin kiel reprezentanton al la kunveno de produktaj avagarduloj. En la kultura revolucio ŝi estis elektita kiel membro de la konstantaj komitatoj de la revoluciaj komitatoj de la komunumo kaj la gubernio. En la jaro 1971 la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj sendis ŝin al la instituto por tie lerni. Ŝi eĉ neniam songis, ke bredistino fariĝis studentino. Ju Gujĵing faris garantion al la Partio kun emocia koro: "Mi nepre faros plej grandan klopodon por plenumi la gloran taskon komisiitan de la Partio kaj ne vanigos konfidon de la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj."

Post vizitado al la instituto, por ripari la mankon de baza scio ŝi serioze antaŭstudis la lecionon donotan kaj atente aŭskultis dum lekiado. Post la kurso ŝi foje-refoje cerbumadis pri la donitaj lecionoj kaj petis helpon de instruistoj kaj kunlernantoj. Dank' al sia diligenteco ŝi akiris relative bonan atingon kaj en la baza teorio kaj en la faka scio.

En marto de 1972, la studentoj de la brutobreda kaj veterinara fako venis al la Gining-a Veterinara Hospitalo por fari praktikon. Tiam estis ĝuste tempo por katri grasajn kaj fortajn virĉevalojn. Tio estas relative grava operacio. Iom da kuraca akcidento kaŭzos perdon al la kolektiva posedaĵo. Iufoje Ju Gujĵing estis komisiita plenumi tian operacion. Post fiksligado, desinfektado kaj anestezo al la virĉevalo ŝi zorgeme faris operacion al ĝi kaj sukcesis en tio. Ekzamenado de rektumo al ĉevalino estas grava tekniko por juĝi la tempon de ĝiaj ovolofalo kaj gravedeco. Estas malfacile posedi tiun teknikon. Direktate de instruistoj ŝi ripetade sin ekzercis en praktiko kaj fine lerte posedis la kuracarton.

Ju Gujĵing kaptis ĉiun ŝancon por lerni. Ŝi atente studis kaj ripetade praktikis la teknikon de ĥirurgia operacio ĝis injektado kaj enbuŝigo de medikamenta infuzaĵo al brutoj. En tiu tempo ŝi altigis ne nur sian nivelon de kuracarto, sed ankaŭ sian konscion de tutkora servado al la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj.



Studentino Ju Gujĵing (la dua de dekstre) diagnozas malsanan ĉevalon kune kun sia instruisto.

Li Giufa

En iu malvarma tago de la kuranta marto, septgrada ventego surmare levis ondojn altajn je 5-6 metroj. Mezurŝipo ŝanceliĝis en ondegoj kaj sin trovis en danĝero je klinangulo de 30 gradoj. Pli ol dek instruistoj kaj studentoj de la geografia fakultato de la Ŝanhaja Pedagogia Universitato en la ŝipo ankoraŭ persistis en esplorado por elekti lokon de nova kajo.

La baldaŭ diplomigonta studento Li Giufa en malsekigitaj vestoj vomis pro marmalsano, sed li ankoraŭ persistis en laboro. Li metis 50-kilograman fluometron profunden je 20-30 metroj en la maron kaj detale notis la akvoprofundecon, fluorapidecon kaj aliajn donitaĵojn.

La ŝtala volo kaj rigora laborstilo de malgranda Li estas elkulturita en praktikado.


En la fino de 1970, post kiam li vizitis la nomitan universitaton, li tuj partoprenis en kritikado kontraŭ la reviziisma eduka linio. Kune kun siaj revoluciaj instruistoj kaj kunlernantoj, li kritikis kaj forigis la eraran penson postrestantan en la geografia fakultato por ĉasi renomiĝon kaj fariĝi specialisto per disertaĵo kaj decidis utiligi la fakon en servo al la socialisma konstruado.

Sub la direkto de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, instruistoj kaj studentoj de la geografia fakultato ofte lernas en praktiko ekster la lernejo. Dank' al helpo de instruistoj Li Giufa kaj aliaj studentoj plenumis taskojn elmetitajn dum la praktikado. En la lernoperiodo de la dua klaso ili venis al Giangkiaŭ-urbeto de Giading-gubernio por desegni

topografiajn mapojn de skalo 1/1000. Tiu tasko estis tre malfacila por la studentoj, kiuj havis malmulte da sperto en praktiko, precipe por la grupo de Li Giufa, kiu devas fari mezuradon en kvartalo kun densaj domoj. Sed ili ne estis timigitaj de la malfacilo. Li Giufa kaj liaj grupanoj ekagis kun plena memfido. Sed neatendite, la urbokonstrua departemento asertis, ke ilia desegnaĵo ne atingis la normon. Li Giufa kaj aliaj ne deprimiĝis pro la malsukceso, resumis sperton kaj trovis la kaŭzon. Tiam iuj lernantoj revenis hejmen por pasigi siajn feriojn, tamen malgranda Li kaj du instruistoj daŭrigis sian laboron. Matene ili biciklis kontraŭ frosta vento al la urbeto kaj revenis al la universitato ĉiam nokte. Post semajno, ili pretigis norman topografian mapon.

Hardite en la praktikado Li Giufa multe progresis ne nur en la faka scio sed ankaŭ en ideologio. Tiufoje post ricevo de la tasko, instruistoj kaj studentoj de la fakultato ĉerpis la lecionon el la laboro en Giangkiaŭ-urbeto, persistis en serioza praktikado kaj disvolvis la revolucian spiriton de penemalukto. Malgranda Li diris, ke oni devas akiri materialon el praktiko. Lernante de navigistoj, ili laboradis sur la ŝipo je sinsekvaj 27 horoj kaj plenumis la tutan mezuradon dum la tempo de du flusoj kaj du malflusoj.

Akirinte la originajn donitaĵojn pri terenteno, akvoprofundeco, fluorapideco k.a., ili faris tagnokte sintezan kalkuladon kaj analizon de tiuj materialoj pli ol unu monatojn kaj plenumis parton de la tasko. Ilia laboro ricevis laŭdon de la koncerna produkta institucio.



FONDIĜIS ELEKTRA IRIGACIA STACIO BAJŜATAN

Elektra irigacia stacio Bajŝatan, la ĉefa konstruaĵo de irigacia regiono de Nengiang-rivero en Ĝenlaj-gubernio de Gilin-provinco, estas konstruita kaj donita al funkciado.

La stacio kun totala kapacito de 2,685 kilovatoj estas la unua relative granda konstruaĵo de Ĝenlaj-gubernio. Ĝi povas ne nur irigacii 21,800 hektarojn da kampoj de tri komunumoj kaj unu ŝtata kultivejo en la orienta parto de la gubernio, sed ankaŭ favori al bredado de fiŝoj, plantado de fragmitoj kaj akvumado de grandarea stepo, kio kreis favorajn kondiĉojn por plene disvolvi agrikulturon, forstumadon, brutobredadon, flankokupojn kaj fiŝbredadon.

Sekretario

Hing Jinglun

DEK tri jarojn Hing Jinglun laboris kiel la sekretario de la partia komitato de Lihian-gubernio de Gansu-provinco kaj starigis intimajn interrilatojn kun tieaj malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj kadroj. Antaŭ nelonge li estis transpostenigita al nova laboro. Antaŭ ol li forlasis Lihian, li refoje vizitis komunumanojn kaj kadrojn tra la gubernio trans montoj kaj riveroj por peti opiniojn pri sia laboro. Li ankaŭ iris al la riverordiga konstruaĵo ĉe Hihan-rivero por kontroli, ĉu ĝi estas solida, kaj al Junŝan-brigado de Ŝikiau-komunumo. Tie li projektis malgrandan akvo-rezervejon kaj partoprenis en la konstruado kune kun la amasoj kaj kadroj. Nur post tio li bedaŭre adiaŭis la kadrojn kaj amasojn de Lihian.

Li trairis preskaŭ ĉiujn vilaĝojn de Lihian kaj havas vastan ligiĝon kun tiea popolo. La Lihiananoj ofte rakontas pri lia revolucia spirito de diligenta servado al la popolo kaj pri liaj kortuŝaj aferoj en la tempo, kiam li konstruis la montregionon kune kun amasoj.

Iun tagon en la komenco de vintro de 1970, malriĉkamparano de Giangkoŭ-brigado Dang Ginĝen iris 20 km. al la gubernia urbo por aĉeti pneŭmatikojn por ĉaroj de la brigado. Sed, tiam la vendejo de agrikulturaj produktaj rimedoj jam fermiĝis. Dang Ginĝen tre maltrankviliĝis kaj decidis peti helpon de sekretario Hing Jinglun. Tiam Hing Jinglun estis vespermanĝanta. Informiĝinte, ke Giangkoŭ-brigado urĝe bezonas pneŭmatikojn en intensa fundamenta konstruado de kampoj, li tuj kun Dang Ginĝen trairis kelkajn unuojn kaj fine trovis iliajn respondeculojn kaj komizojn, tiel ke Dang Ginĝen sukcesis aĉeti la pneŭmatikojn. Kaj li ankaŭ aranĝis por Dang tranoktejon. La malriĉkamparano estis tre kortuŝita pro la entuziasma helpemo de la sekretario. Por ne prokrasti la laboron de sia brigado, li reiris samnokte, danke rifuzinte la komplezon de la maljuna sekretario pri la tranoktiĝo.

Tiu afero prezentis al Hing Jinglun jenajn demandojn: Kial la komunumanoj laboras tiel entuziasme, dum iuj institucioj en la urbo faras sian servon tiom malvarme? Kial oni devis piediri tiel longan vojon kaj renkontis tiom multajn malfacilojn por aĉeti la pneŭmatikojn? Li ekkonsciis, ke la ĉefa kaŭzo de la problemo kuŝas en tio ke li mem ne donis bonan ekzemplon al aliaj kamaradoj en servo al la popolo, tial iuj institucioj iom sin apartigis de la amasoj. Poste, preskaŭ en ĉiu kunveno de kadroj li faris memkritikojn por ke la ĉeestantoj ricevu edukon kaj firme starigu en si la penson servi al la komunumanoj kaj brigadoj. Sub lia inspiro la gvidantoj de ĉiuj fakoj iris unu post alia al komunumanoj kaj brigadoj por koni ilian bezonon; la industria kaj komercaj branĉoj aktive liveris varojn rekte al la vilaĝoj; kaj iuj institucioj starigis deĵoran sistemon, por ke la bazaj kadroj kaj komunumanoj ĉiam ajn ricevu helpon en la urbo.

En la pasinteco Hihan-rivero tra la tuta gubernio estis malutila rivero kaj multjare tiu loko suferadis de sekegeco kaj inundo. Nun la konstruitaj riverdigoj longaj je 200 kilometroj protektas ĉ. 3,000 hektarojn da fekundaj kampoj kaj ebligas al ĉ. 2,000 hektaroj da nove kulturebligataj kampoj ricevi irigacion. En la konstruado de la digoj Hing Jinglun kaj aliaj kamaradoj de la gubernia partia komitato profundiĝis en la amasojn kaj bone faris sian kontribuon.

En vintro de 1968, kiam Hing Jinglun venis al Hegiaĝuang-brigado de Jaĉeng-komunumo, la brigado konstruis ŝtuparkampojn kaj poste komencis jungi riveron per hakado de monto kaj eksplodigo de roko. Tion rigardante, Hing Jinglun pensis: Se Hegiaĝuang-brigado povas ŝanĝi dezertajn montojn kaj ŝtonozajn plaĝojn en bonajn agroj, do tion povas fari ankaŭ aliaj brigadoj de la tuta gubernio. Post sufiĉa tempo da enketado kaj konsiliĝo en la komenco de 1970 Hing Jinglun elmetis en la kunveno de la konstanta komitato de

la revolucia komitato de la gubernio sian ideon jungi Hihan-riveron per la fortoj de la komunumoj kaj brigadoj laŭborde de la rivero. Post la diskutado pri ĝi la ĉeestantoj estis multe kuraĝigitaj kaj decidis sendi unu vicestron de la revolucia komitato al Linhian-gubernio de Henan-provinco por viziti la Kanalon "Ruĝa Flago" kaj lerni ĝian konstruan sperton, kaj alian vicestron kun enketa grupo fari plian esploradon kaj ellabori la projekton.

Estis varmega tago de somero, kiam komenĉiĝis la riverordiga konstruo. En tiu tago, Hing Jinglun kun pajlĉapelo sur la kapo kaj laborilo en la mano venis al la konstruejo de Hinjang-brigado de Ĉengguan-komunumo. Komence, komunumanoj ne povis bone masoni la digon per ŝtonoj, li do kune kun komunumanoj studis kiel tion fari. Kiam mankis al ili cemento, li kune kun ili trovis novan metodon por solvi la malfacilon. Kiam ŝtonoj ne sufiĉis sur la konstruejo, li do gvidis junulojn al la montoj tirante ĉarojn por transporti ŝtonojn. Liaj vestoj estis difektitaj de frotado, la manoj vundiĝis kaj li malgrasiĝis tagon post tago. Vidante, ke la maljuna sekretario kun aĝo de ĉ. 60 jaroj tiel zorgas pri la amasoj, iuj maljunaj malriĉkamaranoj estis tre kortuŝitaj kaj admonis lin: "Maljuna sekretario, vi iom ripozu. Estas sufiĉe ke ni faros iom multe." Tamen tion li rifuzis kaj ĉiutage masonis aŭ kontrolis laboron sur la konstruejo. De varmega somero ĝis frosta vintro kaj de vintro ĝis somero en du jaroj, krom ĉeesto de gravaj kunvenoj kaj oficaĵaj laboroj, li ĉiam laboris sur la konstruejo kune kun la amasoj, kaj tiel li fariĝis lerta ŝtonhakisto.


Hing Jinglun naskiĝis en malriĉkamarana familio. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito li funkciis kiel kadro de distrikto kaj vilaĝo. Tiam li transportis vunditojn kaj armean provianton jam kune kun popolanoj. Ĝis nun li ankoraŭ tenis la modestan kaj praktikan stilon de la kadroj el la laboristoj kaj kamaranoj.

En 1972, informiĝinte de malriĉkamaranoj pri tio ke en brigado de Ĉengguan-komunumo aperis kapitalisma tendenco, la partia komitato de la gubernio decidis, ke Hing Jinglun kun laborgrupo iru tien por helpe solvi la problemon. Post kiam la tasko estis plenumita, la komitato preparis raporton al la supera instanco. La raporto diris: Post trovo de la problemo, "kamarado Hing Jinglun tuj sendis tien laborgrupon por enketo. . ." Kiam la raporto prezentiĝis antaŭ Hing Jinglun, li trovis, ke tiuj vortoj ne konvenas, ĉar ili ne konformas al la fakto kaj kovras lian mankon en la la-

boro. Li tuj anstataŭis la vortojn "kamarado Hing Jinglun" per "la partia komitato de la gubernio" kaj aldonis al la raporto jenan paragrafon: "Ĉengguan-komunumo estas prizorgata de Hing Jinglun, sed longtempe li ne trovis tiun problemon en la komunumo. . ."

La reviziita raporto elstarigis la rolon de la kolektiva gvido de la partia komitato kaj kritikis Hing Jinglun. Iu proponis forstreki la aldonitan paragrafon, sed Hing Jinglun diris: "Kial ni ne sciigas al la supera instanco nian mankon, se ni povas raporti niajn atingojn?"

La reviziado fariĝis paroltemo de la kadroj. Ili diris kortuŝite: "Nia sekretario ne laŭdas sian meriton, nek kovras sian mankon. Li vere estas por ni lerninda ekzemplo."



ELTROVO DE MAMUTA FOSILIO

En Gaŭmi-gubernio de la Giaŭdong-a Duoninsulo de Ŝandong-provinco oni trovis mamutan fosilion konsistantan el kompleta kranio (inkluzive de mueldentoj kaj incizivo kun longeco de tri metroj kaj diametro de 20 centimetroj) kaj partoj de femuralo kaj vosta vertebraro.

La mamuto vivis dum malfrua periodo de plejstoceno (antaŭ ĉ. kvincent mil jaroj ĝis miliono da jaroj) en frostaj regionoj de Eŭropo, Azio kaj Norda Ameriko. La ĉefa trajto de mamuto estas longa nazo, mallonga kolo, granda kapo kaj du supren turniĝantaj incizivoj. Ĝia korpo altas je ĉ. kvar metroj. Kaj la maturiĝinta mamuto pezas ĝenerale pli ol 20 tunojn.

Tiu mamuta fosilio liveras materialon por la studo pri la vivo kaj karakteroj de mamuto, pri la evoluo de terformo, kronologia determino de stratigrafiataj tempoj, variado de klimato kaj evoluo de vivaĵoj en la nomita duoninsulo.

Vizito al la Produkta Brigado Jangkiaŭpan

DEZERTO impresas la homojn tiel, ke en ĝi troviĝas nek arbo nek akvo, sed nur kontinuaj sablaj montetoj sen vivaĵoj. Sed en la produkta brigado Jangkiaŭpan ĉe la suda rando de la dezerto Maŭvusu, ni vidis scenon plenan de viveco.


La brigado el ĉirkaŭ 500 familioj situas en la nordo de Ŝenhi-provinco kaj ĝin trairas la antikva Granda Muro. En 1935 la loko jam estis liberigita kaj en la postaj pli ol 30 jaroj la loĝantoj de Jangkiaŭpan faris obstinan batalon kontraŭ la naturo. Ambaŭflanke de la Granda Muro nun estas grandaj parceloj da nove kulturebligataj kampoj kaj

densaj vicoj da sablaj salikoj formas ĉirkaŭ ili verdajn ŝirmilojn. Komunumanoj sarkas herbojn aŭ ekstermas fiinsektojn en la kampoj. Akvo fluas en kampojn tra la kruciĝantaj kanaletoj...

TRANSFORMI SABLajn MONTETOJN

Norde de Luhe-rivero ni vidis la antaŭan aspekton de Jangkiaŭpan. Tie sablaj montetoj ĉeniĝas unu post alia kaj la sablo preskaŭ englutis la Grandan Muron. Maljuna kamparano Ŝeng Ĝanhaj diris al ni: "La hodiaŭa Jangkiaŭpan ja estas konstruita sur tia sabla dezerto." Li, multe suferin-

Paŝtado





Videbla riĉrikolto de sorgo

ta de frostoj kaj malsato en la malnova socio, estas atestanto de la historio de Jangkiaŭpan. Antaŭ pli ol 60 jaroj lia familio venis ĉi tien por fuĝi de natura katastrofo. Kiel ili sopiris havi siajn kampojn. Lia dua onklo kaj aliaj malriĉaj kamparanoj faris digojn kaj fosis kanaletojn por alkonduki akvon kaj transformi sablan teron en kampojn. Sed, informiĝinte pri tio, bienuloj venis kaj cirkle limigis la kampojn kiel sian propran. Jen la parceloj kreitaj de malriĉaj kamparanoj per granda penado estis forrabitaj de bienuloj.

En 1935, la Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo komandata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ triumfe atingis la nordon de Ŝenhi-provinco. En tiu ĉi jaro stariĝis la popola regpotenco en Jangkiaŭpan. Ŝeng Ĝanhaj fariĝis kompartiano kaj estis nomita kiel respondeculo de la vilaĝo kaj ĝia partia filio. En la jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito, respondante la alvokon de la Centra Komitato de la Partio, la vilaĝanoj aktive disvolvis ardan produktan movadon por subteni la fronton per pli da greno. Sub la gvido de Ŝeng Ĝanhaj, la komunistoj kaj vilaĝanoj alkondukis akvon kaj transformis sablajn terojn en multajn kampojn. Per tio ili disvolvis la agrikulturan produktadon kaj faris

kontribuon al la revolucia milito. En 1942 nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ laŭdis la popolarojn de Jangkiaŭpan-vilaĝo pro ilia atingo. De tiam la skalo de ilia transformado de dezerto fariĝis pli kaj pli granda.


Post la Liberiĝo de la tuta lando, la popolo de Jangkiaŭpan, kiu jam suriris la vojon de kolektivigo, heredis la revolucion kaj faris pli grandskalan transformon al la dezerto. Vintre, malgraŭ tranĉa vento, Ŝeng Ĝanhaj kaj komunumanoj iris dekojn da kilometroj pelante azenojn por alporti ŝtonojn. Per la ŝtonoj ili konstruis la unuan barajon sur Luhe-rivero kaj enkondukis en la dezerton grandan kvanton da riverakvo. Ĉar ili akumulis riĉan sperton en la longtempa transformado de dezerto, ilia konstruado fariĝis pli kaj pli rapida. Per la riverakvo ili ebenigis pli ol 1,000 sablajn montetojn. En somero ili alkondukis diluvon en la ebenigitan sablon kaj sedimentigis la teron alportitan de la diluvo. Sur la dika tertavolo ili kreis bonajn kampojn. Ĉirkaŭ la kampoj ili forstumis 600 hektarojn da tero, sur kiuj la arboj bone baras venton kaj fiksas sablon, kaj konstruis irigacian sistemon. En la sabla dezerto aperis nova vilaĝo ŝirmata de verdaĵo.

AKIRI AKVON EL SUB LA TERO

Post tiu sabla monteto muĝas dizelo kaj akvo fluas el pumpilo. Tio estas la unua profunda puto de Jangkiaŭpan. Nun la vilaĝo jam havas 6 tiajn putojn. Nin forte mirigis la fosita lageto. Lagetoj en dezerto ordinare estas nature formitaj. Kvankam la akvo multe tralikiĝas kaj vaporas, tamen pro sufiĉa subtera akvo la akvo en lagetoj ĉiam tenas certan nivelon. La lageto estis fosita de la vilaĝanoj de Jangkiaŭpan.

Jangkiaŭpan antaŭe irigaciis kampojn per akvo de Luhe-rivero. Sed somere la akvo de la rivero reduktiĝas, pli serioze dum sekegeco. En iu somero, la rivera fluo rompiĝis longtempe. Kun la ekspluato de sabla dezerto, oni bezonis pli multan akvon. Por solvi la problemon la vilaĝanoj aplikis la alilokan metodon fosi cisternojn por konservi akvon. La cisternoj estis fositaj kaj konservis akvon. Sed plejparto de la cisternoj sekiĝis en la tempo, kiam oni bezonis akvon. Ili pensis, ke la akvo en la cisternoj tralikiĝis, tio aludis, ke ankaŭ la pluva akvo certe tralikiĝis kaj sub la sabla tavolo sendube ekzistas abunda akvo. Iuj maljunuloj memoras, ke iam antaŭe post la vilaĝo ekzistis lageto, sed ĝi iom post iom ŝtopiĝis kaj sekiĝis. Aliaj atentigis, ke eĉ en la plej sekaj somertagoj malgrandaj fontoj aperis en la rokmuroj de la okcidenta bordo de

Forstozono kontraŭ vento



Luhe-rivero; eble oni trovos akvon traborinte la sablan kaj ŝtonan tavolon. Ili decidis serĉi akvon sub la tero.

Sekretario de la ĝenerala partia filio de la brigado Ĝan Livu kaj parto de komunumanoj trovis la antaŭan lageton kaj komencis ĝin fosi. Ju pli ili fosis, des pli humida estis la tero. Fine ili trovis akvon. La sukceso firmigis ilian volon. Ili decidis tie fosi lageton. En vintro, la frosta vento malvarmigis homojn ĝis la ostoj. Ĝan Livu kaj la membroj de la Junula Sturma Grupo unue saltis en la glacie malvarman akvon por fosi koton kaj sablon. Kvankam la vetero estis malvarma, tamen la komunumanoj laboris en alta entuziasmo, kuraĝigis unu la alian kaj disvolvis laborkonkurson. Post nelonge aperis lageto kun kapacito de 20,000 kubmetroj. Poste, la komunumanoj de Jangkiaŭpan trovis abundan akvon sub la tera profundo kaj fosis la unuan profundan puton.

La sinsekvaj sukcesoj pretigis kondiĉojn por Jangkiaŭpan en venko de sekegeco kaj akiro de riĉa rikolto. En 1972 la brigado konstruis 7 pumpstaciojn. La lageto, pumpstacioj kaj maŝinputoj garantiis ĝustatempan irigaciadon kaj stabilan disvolviĝon de ĝia produktado. En tiu jaro, la brigado estis trafita de sekegeco nevidita en la lastaj dekoj da jaroj, sed la hektara produktokvanto atingis 4,450 kg, kiu superis la normon difinitan de la ŝtato por la regiono de Jangkiaŭpan. En la kuranta jaro ili refoje venkis longdaŭran sekegecon kaj gajnis abundan someran rikolton de grenoj.

En la sidejo de la brigado la kontisto regalis nin per pomoj. Li diris al ni, ke la pomoj estis produktitaj de Jangkiaŭpan. En la lastaj jaroj, plue efektivigante la principon **“preni grenon kiel ĉefĉeneron kaj samtempe disvolvi ĉiajn produktojn”**, la brigado kulturis pomarbojn, morusarbojn kaj drogherbojn, bredis silkraŭpojn, 2,000 ŝafojn, 450 ĉevalojn, bovojn, mulojn kaj aliajn brutojn. La disvolviĝo de multflankaj produktoj akumulis grandan kvanton da kapitalo por agrikultura mekanikigo. La brigado konstruis per sia propra forto hidroelektrejon ĉe Luhe-rivero, dank’ al kiu la lumigado kaj grena prilaborado de la brigado estis elektrizitaj. La brigado mem akumulis kapitalon kaj aĉetis diversajn agrikulturajn maŝinojn. Nun, oni tute aŭ parte uzas maŝinojn en plugado, irigaciado, grenprilaborado kaj draŝado.

Antaŭ nelonge, la gvidantoj de la brigado iris al sabla dezerto norde de la rivero por fari esploron. Ili intencis krei pli multajn kampojn por ke la oazo fariĝu pli kaj pli vasta.



Prospektorado sur Hongŝan-monto

de DIANHUA

*Kolektado de ercaj specimenoj
sur kruta montodeklivo*

HONGŜAN-MONTO majeste staras sur la vasta Junnan-Gujŝoŭ-altebenajo de Ĉinio. Supre blanka nubaro ŝvebas ĉirkaŭ la montpintoj kaj sube ruliĝas fluegoj. En somero, la plej alta temperaturo ĉi tie superas 40° C, dum pluva sezono montaj torentoj muĝante kuras en la valo.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, ĝuste sur tiu senhoma virga monto, la laboristoj kaj oficistoj de la Naŭa Geologia Taĉmento de la Junnan-provinca Geologia Buroo bonkvalite eltrovis grandan ferkupran minon kun relative alta rapideco, kuraĝigate de la ĝenerala linio **“streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”** kaj helpate de la frataj geologiaj taĉmentoj kaj koncernaj sciencaj institutoj. Kaj per tio ĝi faris kontribuon por disvolviĝo de la ĉina metalurgio.

AL HONGŜAN-MONTO

Iutage de aprilo, 1966, kiam la informo pri nova tasko iri al Hongŝan por prospektori ferminon atingis la naŭan taĉmenton, tuj bolis la sidejo de la taĉmento. La laboristoj kaj oficistoj sciis, ke antaŭe la geologia branĉo faris iam aviadan magnetan esploron super tiu regiono kaj trovis tie fortan neordinaran reakcion de magneto. Oni ankaŭ

vidis iometan malkovron de fermino. Ili esprimis ke, por plirapidigi la disvolviĝon de metalurgia industrio kaj la paŝon de socialisma konstruado, ili nepre trovos grandan ferminon por la patrio!

Multaj malfaciloj troviĝas sur la vojo al Hongŝan. Rivero trakuras la valon kaj baras la vojon al la monto. Transirinte la riveron oni ankoraŭ devas iri naŭ kilometrojn. Altaj montoj kaj kru-taj rokoj baras ilian aliron. Troviĝas tie neniu ponto por transiri la riveron nek vojo por surgrimpigi la monton.

Por plej rapide transporti materialojn kaj ekipaĵojn al Hongŝan por ĝustatempe komenci geologian laboron, avangardo venis al la rivero por serĉi vojon. Ili mezuris la akvan profundecon kaj fluan rapidecon kaj esploris la stacion de monta torento. Utiligante la intertempon de pluvegoj kaj inundoj la laboristoj de la naŭa taĉmento urĝe transportis materialojn kaj ekipaĵojn per homfortoj kaj ĉevaloj, vadante la riveron kaj surgrimpante la monton.

Rapida prospektorado bezonis pli multe da materialoj kaj ekipaĵoj. Ili venkis multajn malfacilojn por konstrui ŝoseon kaj sukcesis transporti tiujn bezonatajn materialojn kaj ekipaĵojn ĝustatempe al Hongŝan per aŭtoj.

PROSPEKTORADO

Surgrimpinte Hongŝan-monton, la laboristoj kaj oficistoj de la naŭa taĉmento tuj faris malkovron de tersurfaco sur kruta deklivo.


Tigra Faŭko estas unu el la famaj krutaj deklivoj. Tie tuj ĉe la montpiedo staras rokmuro kelkdek metrojn alta, supre de ĝi estas ŝtona kruta deklivo dekkelkajn metrojn longa kaj pli supre estas refoje rokmuro kelkdek metrojn alta. Laŭ la postulo de geologia laboro, oni devis fari longan fosajon sur tiu ŝtona deklivo. Pro la danĝereco, la taĉmentestro tre hezitis pri tio. Ĝuste en tiu tempo, venis altstatura junulo kaj diris al la estro: "La laboron ni plenumu!" La junulo estas nomata Liu Venĉong, kompartiano kaj estro de la laborgrupo, li laboras nelonge en tio sed tre fervore. Kie troviĝas malfacilo kaj penlaboro, tie li ĉiam aperas.

Gvidantaro konsentis la peton de Liu Venĉong. En la sekvinta tago, li kune kun aliaj du kolegoj surgrimpis la deklivon por preni de tie specimeno de rokmineralo. Unue ili faris eksplodigon por formovi eroziajn rokojn. Foje post eksplodo, Liu Venĉong venis al la eksplodejo por forigi disrompitajn ŝtonojn. Tiam granda ŝtono malsupren ruliĝis sur la deklivo pro tremado kaŭzita de eksplodo kaj lin grave vundis. Pro troa sangado, Liu Venĉong oferis sian junan vivon por la geologia afero de la patrio.

Martiriĝis Liu Venĉong, tamen lia revolucia spirito kuraĝigis ĉiujn aliajn al pli rapida prospektorado. Ili diligente laboris kaj elfosis 35,000 kubmetrojn da rokaĵo en la loko kie Liu Venĉong sin oferis, kaj kolektis riĉajn geologiajn materialojn kun ĉ. mil specimenoj de rokmineralo.

Tie sin trovas roka krutaĵo de la valo n-ro kvara, 200 metrojn alta kaj 80 metrojn larĝa, kvazaŭ giganta ŝtonmuro. Ĝi servis kiel bonega natura sekcaĵo por observi la strukturon de rokminerala tavolo, tial ĝi havas gravan signifon por koni la tersurfakon de Hongŝan. Sed surgrimpado al la krutaĵo estas danĝera kaj malfacila.

Antaŭ la giganta malfacilo, junaj teknikistoj Ĉen Banggian, Liu Ĵuliang kaj Vang Janĉun diris, ke la popolaj geologiaj laborantoj nepre devas konkeri la krutaĵon. La forta respondeco inspiris ilin en grimpadon de la krutaĵo. Pere de dentaĵoj de la roko, ili aplombe surgrimpis la kulminon. Dum la grimpadon, ili atente esploris kaj kolektis geologiajn materialojn. La surgrimpado fariĝis pli malfacila en la loko 30-40 metrojn sub la kulmino. Tiam ili subite rimarkis sur la rokmuro fendon 50-60 cm. larĝan, kiu rekte iras al la kulmino. Ili vidis en la fendo mineralan korpon kaj surgrimpis la kulminon laŭ la fendo per la tuta forto. Fine, la dikeco kaj orientiĝo de la minerala korpo sur la roka krutaĵo de la valo n-ro 4 estis konita.



Gvidanta membro kaj laboristoj de la geologia taĉmento kune studas pri reformo de instrumentoj.

POR ANTAŬDATE PLENUMI LA TASKON


En la komenco de 1970, la koncerna branĉo postulis ke la naŭa taĉmento elmetu raportajon pri prospektorado antaŭ aŭgusto de tiu jaro. Tio signifas antaŭplenumon de la plano je kvar monatoj, t.e. oni devas plenumi la laboron per ok monatoj, kiun oni devis fari per du jaroj antaŭ la kultura revolucio. La laboristoj kaj oficistoj de la naŭa taĉmento respondis: Oni devas ĉiamaniere antaŭdate plenumi la taskon por la socialisma konstruado.

Por plirapidigi la prospektoradon, oni bezonis drilon por profunda borado, sed tia drilo ne povis esti tuj alportita. La laboristoj kaj oficistoj de la drilo n-ro 4 elpensis multajn rimedojn kaj fine faris per alia drilo profundan boradon de 1,040 metroj kun normala kvalito.

Tia spirito troviĝis ĉe ĉiuj laboristoj kaj oficistoj de la naŭa taĉmento. La laboristoj liberigis latentajn fortojn kaj meminciate ŝparis homfortojn por funkcii pli da driloj; la muntistoj kaj transportistoj laboregis tage sub arda suno kaj nokte per torĉo, tiel ke ili mallongigis la tempon de muntado kaj transportado por ĉiu drilo je du aŭ tri tagoj; la riparistoj sub la gvido de kompartiano Ĉen Ĉikjuan zorgeme faris sian servon spite de vento kaj pluvo kaj garantiis la normalan funkciadon de maŝinoj. Dank' al la kuna klopodado, la taĉmento ĝustatempe plenumis la taskon kaj elmetis la geologian raportajon, kaj per tio ĝi metis bazon por plirapidigi la prospektoradon de Hongŝan.

POR LA POPOLO

Ili faris bortruojn de malgranda kalibro en limareo de la prospektora regiono, sed oni ankoraŭ ne faris mezuradon al la klineco de tiuj truoj pro manko de tiakalibra klinometro. Tiuj truoj estis faritaj per diamanta drillilo, tial la zigzageco povas esti permesata de geologia prospektorado. Ĉu oni ankoraŭ devas mezuri tiujn ĉi truojn? Pri tio la laboristoj kaj oficistoj faris varman diskutadon. La plejmulto de la kamaradoj opiniis, kvankam la zigzageco estas negranda, tamen profunda truo kaŭzis grandan anomalion. Se oni ne mezuris la zigzagan pozicion kaj klinecon de la truoj, oni ne povas ĝuste koni la subteran staton de la minerala korpo, ĝuste difini ĝian sferon kaj precize kalkuli ĝian rezervatan kvanton, tio multe influos la fidindecon de la prospektorado kaj kaŭzos perdon al la mineja konstruado. Ni devas altkvalite plenumi la taskon, tio estas nia respondeco al la popolo. Post la diskutado, la tuta taĉmento unuigis sian konon, sukcese reformis klinometron en tiun de malgranda kalibro kaj faris mezuradon al la truoj.



La ŝoseo kun longeco de 30 kilometroj konstruita de la geologiaj laborantoj garantias la liveradon de prospektoraj materialoj.

Per tio ili provizis fidindan materialon por plamplekse taksi la mineralan regionon de Hongŝan.

Dum la prospektorado, la laboristoj kaj oficistoj de la naŭa taĉmento persiste faris primitivan noton pri ĉiu borita truo, akurate plenumis hidrologiajn mezurojn, ofte korektis eraron de la trua profundo kaj ĝustatempe kalkulis procentojn de kernopreno. Kiam ili trovis la boritan truon nenormala, ili tuj faris al ĝi reĝustigon. Se tio ne povis esti efektivigita, ili preferis fari refojan boradon.

Dank' al la diligenta laborado, la laboristoj kaj oficistoj de la naŭa taĉmento difinis la sferon de la subtera mineralo de Hongŝan-monto, klare konis la geologian strukturon de la regiono, kaj la rezervan kvanton kaj rangon de la mineralo. Per tio ili provizis la ŝtaton per granda ferkupra riĉfonto.

EN la Orienta Ĉina Maro ĉirkaŭ la insulo Hingfu vivas speco de rara fiŝo nomata mar-karaso (*Ditrema Temminckii Bleek*).

Mar-karaso estas tre bongusta, sed tre rara. Fiŝistoj apenaŭ povas kapti po unu en 3-5 jaroj. Antaŭ la Liberiĝo, la fiŝtirano regis la fiŝistojn de la tuta insulo kaj ordonis ke kaptinte mar-karason la fiŝistoj donu ĝin al li sed ne mem manĝu.

En iu jaro, la edzino de fiŝisto Ade naskis sian unuan infanon. Pro manko de nutraĵo la patrino


kaj bebo estis tre malgrasaj kaj malfortaj. Ĝuste tiam, Ade kaptis mar-karason kaj ŝtele ĝin kunportis hejmen. Tuj post kiam li stufis ĝin por sia edzino, la fiŝtirano kun kelkaj lakeoj entrudiĝis en lian domon. Ili forrabis la stufitan mar-karason, forte batis Ade kaj lian edzinon kaj renversis la lulilon, tiel ke la bebo tuj mortis, kaj lia edzino preskaŭ perdis sian vivon pro serioza malsano.

Post la Liberiĝo, la fiŝistoj faligis la tiranon kaj fariĝis mastroj de la insulo. Post nelonge la edzino de Ade naskis la duan

infanon. Kuracistino de ĈPLA atente flegadis la akuŝantinon, ĉar tiam Ade fiŝkaptis sur la maro. La bebo naskiĝis sekure. Kaj la patrino kaj la bebo estis tre sanaj.

Ĝuste en tiu tago, Ade ankoraŭfoje kaptis mar-karason. Reveninte hejmen, li tre kortuŝiĝis de la zorga flegado de la kuracistino kaj volis donaci al ŝi la mar-karason. Sed la lasta firme rifuzis, kaj finfine restigis ĝin al la akuŝantino.

La novaĵo rapide disvastiĝis tra la tuta insulo.



NOVAJ ATINGOJ EN LA FUNDAMENTA KONSTRUADO

Ĉi-jare, novaj atingoj estis akiritaj en la fundamenta konstruado de Liaŭning, Ŝandong, Hubej, Ŝenhi, Junnan kaj aliaj ok provincoj, kaj tri municipoj Pekino, Ŝanhajo kaj Tiangin. Laŭ la statistiko, en la unua duonjaro de 1973, ilia finkonstruita areo pliiĝis je 21%, la laborkvanto de konstruado kaj instalado je 17%, la produktiveco je 16% kompare kun tiuj en la sama periodo de la pasinta jaro. Kaj ankaŭ la kvalito de la konstruaĵoj estis iom pli bona. Dank' al ekfunkcio de nombro da nove konstruitaj fabrikoj kaj minejoj, la kapablo de koncentrado kaj aglomero de fera erco, la kapablo de ekspluatado de karbo kaj nafto kaj la kapablo de elektrodona ekipaĵoj, ĉiuj pliiĝis je unu- aŭ kelk-oble kompare kun tiuj de la sama periodo en la pasinta jaro. Kaj ankaŭ plu altiĝas la produktopovo de

agrikulturaj maŝinoj, malpeza industrio, metalfandado kaj laminatado.

ELEKTRA AFERO DE LA KAMPARO EN DISVOLVIĜO

Ekde la kultura revolucio, vigle disvolviĝas la elektra afero en la kamparo de la provinco Hejlonggiang. La alt- kaj bas-tensiaj elektrofadenoj instalitaj en la kamparo kreskis po du-oble, la kapacito de transformita elektro preskaŭ du-oble, la instala kapacito de elektraj pumpstacioj pli-ol-du-oble kaj la elektrokvaranto provizata al la kamparo tri-oble, kompare kun tiuj antaŭ la kultura revolucio. Elektroprovizaj fakoj de la provinco prenas la subtenon al agrikultura produktado kiel sian ĉefan taskon. La Elektra Administrado de Hegiang-subprovinco sendis laborantojn en 1972 sole je pli ol 2,000 person-fojoj al vilaĝoj kaj tie instalas totale pli ol 300 km. da alt- kaj bas-tensiaj elektrofadenoj, tiel ke 88.7 procentoj de komunumoj el 13 gubernioj de la subprovinco havas elektron.

Por Pliigo de Amikeco kaj Interŝanĝo de Ludarto

**Pri la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro
de Azio, Afriko kaj Latinameriko**

La Ĉefurba Sporta Halo de Pekino





La emblemo de la turniro akompanata de pekinaj junulinoj iras en la konkursejon.



Florojn al la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj geamikoj



Gastoj en la inaŭgura ceremonio






La palestina delegacio



La tanzania delegacio



La perua delegacio




Pli ol 1,100 tablotenisaj sportistoj kaj aliaj amikoj venintaj de 86 landoj kaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko partoprenas en tiu ĉi signifoplena grandioza inaŭguro.


Gratulon pro la venka inaŭguro de la turniro








Koreaj kaj ĉinaj sportistinoj man-en-mane marŝas en la konkursejon.



Streĉa konkursado







bstina batalstilo kaj la amikeca kaj unuiga spirito de
artistoj vekis varman manklakadon ĉe la rigardantoj.



Virina parludo inter la ĉilia kaj egipta teamoj



Japana sportistino Hamada Miho en konkurso




Maŭritaniaj kaj ĉinaj sportistoj en interŝanĝo de ludarto



La ĉina teamo, kiu gajnis la ĉampioncon de la virina teama konkurso



Kongolanda kaj bolivia sportistinoj subskribas por memoro unu al alia.



La korea teamo, kiu gajnis la duan lokon de la virina teama konkurso



Ĉinaj kaj koreaj gesportistoj varme interparolas.



La japana teamo, kiu gajnis la trian lokon de la virina teama konkurso



La ĉina teamo, kiu gajnis la ĉampionecon de la vira teama konkurso



Sportistinoj de la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj Niĝerio amike faras interparolon.



La japana teamo, kiu gajnis la duan lokon de la vira teama konkurso



Sportistoj de la Respubliko de Suda Vjetnamio kaj Kamboĝo donacas memoraĵojn unu al alia.



La korea teamo, kiu gajnis la trian lokon de la vira teama konkurso



Sportistinoj de Laoso (la Laosa Patriota Fronto) kaj Palestino



La aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj gesportistoj varme ĝojkrias sub la emblemo de la turniro simbolanta la grandan unuiĝon de la tri kontinentoj.



Aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj geamikoj en amuza kunveno en parko.




Granda sufleo farita de kuiristoj de la hotelo por celebri la inaŭguron de la turniro.


Kostarikaj sportistoj en la Amikeca Magazeno



Gesportistoj de Laoso (la Laosa Patriota Fronto) en amuza kunveno



Somaliaj gesportistoj kantas pri amikeco.




Urugvajaj gesportistoj vizitas la Pekinan Duan Kotonŝpinejon.



Ĉinaj knabinoj kaj venezuela sportistino



Latinamerikaj gesportistoj kaj ĉinaj knabinoj kune dancas.



Argentinaj geamikoj en amuza kunveno.



Aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj gesportistoj sin amuzas en la hotelo.



Aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj geamikoj sur la Granda Muro

Grandioza Kunveno de Solidareco kaj Amikeco

—Notoj pri la Tablotenisa Amika Invita

Turniro de Azio, Afriko kaj Latinameriko

DE la 25-a de aŭgusto ĝis la 6-a de septembro, okazis en nia ĉefurbo Pekino la Tablotenisa Amika Invita Turniro de Azio, Afriko kaj Latinameriko. Kun profunda amikeco de siaj popoloj, geamikoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko venis al Pekino transpasinte oceanojn kaj montojn, kaj ili ricevis varmajn akcepton kaj bonvenigon de la pekina popolo.

En tiu amika invita turniro partoprenis pli ol 1,100 sportistoj kaj delegitoj el 86 landoj kaj regionoj (31 aziaj, 32 afrikaj kaj 23 latinamerikaj) de la tri kontinentoj. Ĝin vizitis laŭ invito ankaŭ gvidantoj de la Internacia Tablotenisa Federacio, la Azia Tablotenisa Unio, la Afrika Tablotenisa Federacio, la Sudamerika Tablotenisa Federacio, la Kariba Tablotenisa Federacio, la Araba Tablotenisa Federacio, kaj aliaj honorindaj gastoj. Tiu ĉi turniro estis senprecedenca en la historio de tablotenisa sporto de Azio, Afriko kaj Latinameriko.

Precipe ĝojinde por ni estas, ke ankaŭ tablotenisaj teamoj de ĉinoj de Tajvan-provinco elmigrintaj al Japanio kaj Usono revenis al la patrolando por partopreni la turniron, kaj kune kun la samlandanoj en la patrolando faris kontribuon en akcelado de la amikeco inter la popoloj de la tri kontinentoj.

La celo de la turniro estis akceli la amikecon kaj solidarecon inter la popoloj kaj sportistoj de la landoj kaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj akceli la disvolvon de la tablotenisa sporto de

tiuj kontinentoj. Tiu ĉi turniro estas grandioza kunveno de solidareco kaj amikeco. Ĝi ne nur estas signo de la granda solidareco inter la popoloj kaj sportistoj de la tri kontinentoj, sed ankaŭ spegulas la prosperan disvolviĝon de ilia tablotenisa sporto.

KOMUNA DEZIRO

“Mi venas por amikeco!”

“Amikeco kunligas nin!”

Tiel diris geamikoj el Koreio, Vjetnamio, Japanio, Pakistano, Irano, Zambio kaj Ĉilio, kiel ankaŭ aliaj geamikoj el aliaj landoj kaj regionoj. Akceli la amikecon kaj solidarecon estas la komuna deziro de la popoloj kaj sportistoj de la tri kontinentoj.

La Delegacio de la Respubliko de Suda Vjetnamio estas la unua sporta delegacio elsendita de ĝi post la venko de la Kontraŭsona Nacisava Milito. Alveninte al Pekino, ili diris sincere, ke ili en la turniro ne nur interlernos kun la geamikoj de diversaj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko por kune altigi la tablotenisan arton, sed pli grave estis, ke ili alportis la fratan amikecon de la vjetnama popolo al la geamikoj de diversaj landoj de la tri kontinentoj, ke ili venis por amikeco. Antaŭ sia veturo al Pekino, la Laosa Delegacio (la Laosa Patriota Fronto) estis speciale akceptita de respondeculo de la Centra Komitato de la Laosa Patriota Fronto, kiu diris al la delegitoj, ke gajno aŭ perdo

en la turniro estas afero dualoka, sed antaŭ ĉio oni devas akceli la amikecon inter la popoloj kaj sportistoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko. Nia palestina amiko Rabee Hafez El Turk, vicprezidanto de la Azia Tablotenisita Unio, ofte veturis al la flughaveno de Pekino por bonvenigi diverslandajn geamikojn kaj transdoni al ili la saluton de la palestina popolo.

Koreaj kaj laosaj sportistinoj intervidiĝis en ekzercejo. Eminentata sportistino Ĉa Kjung Mi foje kaj refoje demonstris al laosa sportistino Phouany Phet teknikon de serviro, rebato kaj malsuprenbato. Se Phouany Phet faris lertan baton, ŝi tuj gratulis ŝin kaj samtempe ŝi ankaŭ lernis ŝiajn fortajn punktojn. Inter la latinamerikaj geamikoj sin trovis veterana sportistino nomata Olga Dina Noemi Carreira, kiu okfoje gajnis la tutlandan ĉampionecon de virina solludo de Argentino. Alveninte al Pekino post veturado trans vasta oceano, ŝi diris emocie al ĵurnalisto, ke tio estas kulmina evento en ŝia sportista vivo, ke ŝi povas partopreni en la grandioza turniro je sia aĝo de 51 jaroj, kaj ke ŝi povos tie ĉi lerni multan valoran sperton de diverslandaj geamikoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj akiri multajn novajn geamikojn.

Tiu ĉi grandioza turniro estis rezulto de komuna klopodado de la registaroj, popoloj kaj sportistoj

de diversaj landoj kaj regionoj de la tri kontinentoj. Dum la tagoj de preparado de tiu ĉi grandioza turniro, Helios Farrell, prezidanto de la Meksikia Tablotenisita Unio, Guillermo Nasser, vicestro de la Meksikia Tablotenisita Delegacio, kaj Plutarco Zuniga Caro, prezidanto de la Ĉilia Tablotenisita Unio, senlace vizitis multajn latinamerikajn landojn kaj regionojn por sukcesigi la aferon. Ankaŭ la delegitoj de alilandaj tablotenisaj organizoj partoprenintaj en la preparado faris grandajn kontribuojn por la okazigo de la grandioza turniro. Kiam la invitilo estis sendita al Zairo, tiu lando ankoraŭ ne organizis tutlandan tablotenisitan teamon. Sed por esprimi amikecon al la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, Prezidanto Mobutu persone decidis, ke Zairo partoprenu en tiu ĉi turniro, kaj komisiis al la Junula kaj Sporta Ministerio rapide organizi delegacion kaj elekti gesportistojn por la turniro. Kiam tiu nova tablotenisita trupo alvenis al Pekino, ĝiaj membroj diris emocie: "Jen ni venas por akceli la amikecon kaj unuiĝon inter la popoloj de Zairo kaj la aliaj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko." En la pasinta jaro, forta tertremo okazis en Nikaragvo. Tamen post ricevo de la invitilo, la tablotenisita organizo de tiu lando aktive organizis delegacion, elektis sportistojn kaj faris al ili trejnadon. La peza katastrofo alportita



Gesportistoj de Argentino kaj Dahomeo kune kantas pri amikeco.



Laboristinoj de la Emajla Fabriko de Pekino preparas pokalojn por la Tablotenisa Amika Invita Turniro de Azio, Afriko kaj Latinameriko.

de la tertremo ne povis bari la tablotenisajn sportistojn, ili veturis trans la vasta oceano kaj venis al Ĉinio.

Kial la geamikoj de diversaj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko tiel alte taksis la turniron? Kia forto tiel strikte kunligis la korojn de la popoloj de tiuj kontinentoj? Claude Constantino, estro de la Senegalia Tablotenisa Delegacio diris prave: “Ĉiuj niaj landoj estas landoj disvolviĝantaj, kiuj havis samajn suferojn en la pasinteco kaj hodiaŭ havas komunan celon.”

NOVA MORO EN KONKURSO

Ĉe la pli ol 30 ludotabloj en la Ĉefurba Sporthalo kaj Laborista Sporthalo de Pekino flugadis arĝentaj pilkoj, kiuj formis amikecajn pontojn inter Azio, Afriko kaj Latinameriko. Interlerni por kune altigi la tablotenisan teknikon kaj meti amikecon super gajnon kaj perdon estis ĝenerala moro en tiu amikeca invita turniro.

En virina solludo, ni vidis ke la pli-ol-40-jara sportistino de Bolivio Zvenka De Rosso konkursis kun Jokota Saĉiko, ĉampiono de virina solludo de Japanio. La obstina persistemo de la veterana sportistino foje kaj refoje vekis varman aplaŭdadon. Zvenka De Rosso ne ludis tablotenison jam de dudek jaroj. Ŝi denove prenis batilon lastatempe por akceli la solidarecon kaj amikecon inter la tablo-

tenisaj geamikoj de la mondo. Ŝi diris: “Gajno aŭ perdo en ludo estas dualoka, tamen gajno de amikeco estas afero la plej grava.”

La japana teamo ricevis laŭdon de diverslandaj amikoj kaj la spektantoj pro sia nefierigo en venko kaj nedeprimigo en malvenko. Post ĉiu maĉo, la japanaj teamanoj, ĉu ili venkis aŭ ne, serioze resumis sian sperton por lerni fortajn punktojn de aliaj kaj venki siajn difektojn. En teama konkurso, ili venkis la singaporan teamon, tamen ili same serioze analizis la kaŭzon de la 15 perditaj batoj. Kvantam ili malvenkis en la konkurso kun la ĉina teamo, la tuta teamo tamen kunvenis por resumado. La instruisto de la japana teamo Imaĵ Joŝiharu diris emocie: “Modesteco kaj lernemo estas vojo por altigi la ludarton kaj ankaŭ premiso por plifortigi la amikecon.”

Kiam streĉe iris la konkurso inter la teamoj de Kamboĝo kaj Trinidado kaj Tobago, sportisto de la lasta Lionel Darceuil falis pro troa fortostreĉo por savo de pilko, en la naŭa venkocodecida submaĉo. La kamboĝa sportisto Liang Siung tuj formetis sian batilon, kuris al li kaj sin klinis por masaĝi lin, kaj aliaj kamboĝaj sportistoj ankaŭ kuris al li kaj varme konsolis lin. La maĉo finiĝis per venko de la kamboĝa teamo. Tiam la sportistinoj de la teamo de Trinidado kaj Tobago tuj kuris al la kamboĝaj teamanoj kaj varme gratulis ilin pro ilia gajno de

la grupa ĉampioneco. La spektantoj varme manklakadis pro la nobla moro inter ili.

La Virina Tablotenisista Teamo de Malio fondiĝis je la komenco de la kuranta jaro. Kiam la singapora teamo informiĝis, ke ĝi konkuros kun la malia teamo, ĝiaj membroj diris, ke amikeco estas pli grava ol konkurso kaj ili devas helpi la maliajn amikinojn bone ludi por ke la juna teamo progresu rapide. Ili serioze interkonsiliĝis pri sia taktiko kaj decidis akomodiĝi al la karakterizaĵoj de la ludarto de la maliaj amikinoj, kaj samtempe modeste lerni iliajn fortajn punktojn. Post la komenciĝo de la konkurso, la singaporaj teamoj serioze faris ĉiun baton, dum la maliaj sportistinoj neniom timis la fortajn rivalojn kaj ludis brave kaj obstine. Ilia ludarto rikoltis varmajn aplaŭdojn de la spektantoj.

Laŭ internacia regularo, nur tri sportistoj povas partopreni en teama konkurso kaj ili ne devas esti ŝanĝitaj dum ludado. Kiam la cipra vira teamo kaj la afgana vira teamo estis komenonta decidan maĉon, afgana sportisto Mohammad Naim Samimi subite falis en sian malnovan stomakan malsanon. La cipraj amikoj tre zorgis pri lia sano kaj, pensante ke la celo de la turniro estas akceli amikecon kaj ludarton, ili lasis la rivalan teamon ŝanĝi sportiston kontraŭ la rutina regulo. La nobla faro de la cipra teamo tre kortuŝis la afganajn sportistojn kaj ankaŭ ricevis laŭdon de la publiko.

Multaj teamoj unuafoje partoprenis en internacia konkurso. Ili diligente sin ekzercis, modeste lernis, prenis la konkursejon kiel amikecan klasĉam-

bron kaj multe altigis sian teknikan nivelon dum la konkursado. Ankaŭ la kongolanda teamo unuafoje partoprenis en internacia konkurso. Kvankam la teamoj perdis la ludojn, tamen la teamestro Gregoire Matoumpa diris ĝoje: "Tio ĉi estas maĉo kaj samtempe ankaŭ tre bona ekzerco. Ambaŭ niaj teamoj bone ludis, kaj ni ĉiuj gajnis!" Jes, ĉiuj estis gajnintoj. Ili gajnis amikecon kaj lernis ludarton. Tio estis la komuna rikolto de la tablotenisaj sportistoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko!

ARPE APERAS GEKNABAJ TABLOTENISISTOJ

Oni rimarkis kun ĝojo, ke tablotenisista sporto prospere disvolviĝas en Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj novaj sportistoj fortike kreskas.

Al tiu ĉi turniro, preskaŭ duono de la partoprenantaj landoj kaj regionoj sendis pli ol 70 geknabajn tablotenisistojn, precipe la delegacioj de latinamerikaj landoj kaj regionoj plejparte havis geknabajn sportistojn. Diligente lerni por altigi la ludarton kaj fari kontribuon al amikeco estis la komuna volo de la junaj sportistoj.

La korea 16-jara sportisto Kim Ĉang Am altiris al si apartan atenton de la publiko. Liaj lerta ark-bato, rapida rebato, vigla paŝado kaj obstina batalvolvo foje kaj refoje vekis aplaŭdojn de la spektantoj. Liaj tri pliaĝaj gefratoj estas koreaj eminentaj sportistoj kaj ankaŭ liaj gepatroj estas tablotenisaj amatoroj, tial lia familio estas nomata "familio de tablotenisistoj". Malgranda Kim ŝatas ludi tablo-

Kim Ĉang Am, la knaba sportisto de Koreio, gajnis la ĉampionecon de la knaba solludo, Somdej (Tajlando) la duan lokon, Sakamoto Keniĉi (Japanio) kaj Hong Ĉul (Koreio) la trian lokon, kaj Maung Tin Oo Lin (Birmo), Esquejo (Filipinoj), G. Raonindriaka (Madagaskaro) kaj Bedoya (Kolombio) la kvinan lokon.



tenison de sia infaneco, li diligente sin ekzercadis kaj altigis sian ludarton tre rapide. Ĉifoje li partoprenis en la turniro kune kun sia fratino. Veninte al Pekino, li modeste lernis, senĉese resumis sperton kaj levis sian ludarton al nova nivelo. En la konkursado, li gajnis multajn maĉojn kaj fariĝis ĉampiono de knaba solludo.

Dum iu virina teama konkurso, la spektantoj senĉese manklakadis por la 11-jara knabino Dede Odile D'almeida de Togolando pro ŝia batalspirito. En tiu konkurso, ŝi venkis sinsekve du pliaĝajn fratinojn de la rivala teamo. Poste, ŝi renkontis la ĉefsportistinon de la rivala teamo, kiu lertis je arkbato. Ŝi ludis aplombe kaj sagace kaj gajnis la unuan seton. Je la tria venkdecida seto, la rivalo senĉese faris rapidajn arkbatojn. Dede Odile D'almeida ŝanĝis sian ludmanieron kaj superregis la arkbatan ofensivon de la rivalo. Kiam iliaj poentoj estis 20 kontraŭ 15, ŝi subite komencis furiozan ofensivon per malsuprenbatoj kaj gajnis la maĉon.

En la konkursejo, oni ofte vidis ke apud ĉina sportisto Hi Enting sidas blonda knabineto. Ŝi estis 10-jara Elizabeth Popper, la ĉampiono de virina solludo de Venezuelo. Delonge ŝi jam deziris amikiĝi kun ĉinaj sportistoj kaj modeste lerni de veteranoj. Iutage, ŝi vidis en ekzercejo ĉinan sportistinon Ĝeng Mingi kaj komencis sin ekzerci kun ŝi. Ŝia alia deziro estis ludi ekzerce kun Hi Enting, la vira ĉampiono de la 32-a Monda Tablotenisa Ĉampionea Turniro. Ŝi trovis Hi Enting kaj tiu ĉi helpis ŝin amzorge kiel sian fratineton, kaj speciale

donis tempon por ekzerca ludo kun ŝi. Li kuraĝigis ŝin, ke ŝi fariĝu eminenta sportistino. La 30-a de aŭgusto estis naskiĝdato de Elizabeth Popper. Tiu-tage, Hi Enting speciale gratulis ŝin per donacoj.

La japana Abe Hirojuki, la birma Ma Kin Vin, la ĉina Vang Gialin, la kuba Raquel Ortiz Tresod kaj la tajlanda Somdej Saichitborisuth jam fariĝis novaj fortoj de tablotenisa sporto kun relative perfekta tekniko. La junaj gesportistoj Jap Chin Boon de Singaporo, Ahmed Zayed de la Araba Jemena Respubliko, Mario Bedoya de Kolombio kaj Anabel Vitullo de Argentino k.a. estas en rapida progreso kaj ili estas esperplena nova generacio de la tablotenisa movado de Azio, Afriko kaj Latinameriko.


VIVU AMIKECO

*“Trans maroj kaj montaroj
de la tri kontinentoj venis amik-rondoj.
L' arĝentpilket' kunportas amikecon,
solidarec' disfloras tra la tuta mondo!”*

Dum la Tablotenisa Amika Invita Turniro de Azio, Afriko kaj Latinameriko, ĉie floris amikeco kaj solidareco. La amikeco inter la popoloj kaj sportistoj de diversaj landoj kaj regionoj de la tri kontinentoj ricevis novan disvolviĝon.

Dum la restado en Pekino, plifirmiĝis la amikeco inter la malnovaj geamikoj de la tri kontinentoj kaj ili konatiĝis kun pli kaj pli multaj novaj geamikoj. En la Amikeca Hotelo gesportistoj kun malsamaj haŭtkoloroj varme interbabilis; sur stratoj de Pekino aŭdiĝis iliaj kantoj pri amikeco en diversaj lingvoj;

Ma Kyin Win, la knabina sportistino de Birmo gajnis la ĉampionecon de la knabina solludo, Ĉang San Sun (Koreio) la duan lokon, Jip Poh Ĉeng (Malajzio) kaj Ortiz (Kubo) la trian lokon, kaj Maeda Kumi (Japanio), Lin Pej-ĉing (Aŭsteno), Dede D'almeida (Togolando) kaj Laŭ Vah (Hongkongo) la kvinan lokon.





Kim Ĉang Ae kaj Pak Jong Sun de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio gajnis la ĉampionecon de la virina parludo, Ĉa Kjung Mi kaj Pak Jong Ok (Koreio) la duan lokon, Ĝeng Huaj-ĵing kaj Ĝang Li (Ĉinio) kaj Hamada Miho kaj Jokota Saĉiko (Japanio) la trian lokon, kaj Do Thuy Nga kaj Tran Thi Thi (la Vjetnama Demokratia Respubliko), Minvala kaj Usmani (Pakistano), Avaria kaj Pastenes (Ĉilio), kaj Jacks kaj Johnson (Niĝerio) la kvinan lokon.

en fabrikoj, popolaj komunumoj kaj lernejoj ili amike interparolis kun ĉinaj laboristoj, kamparanoj kaj lernantoj; en infanvartejoj, la fremdlandaj geamikoj ame premis viglajn infanojn en sian sinon kaj bondeziris al ili sanan kreskadon; kaj en amuza kunveno en parko ili ĉirkaŭprenis unu alian, varme ĝojkriis, laŭte kantis kaj kune sin fotis por memoro. Tiaj kortuŝaj scenoj ekscitis ĉies koron.

Sur la aŭto de la delegacio de Ekvatora Gvineo ofte aŭdiĝis kantado: “Vivu eterne la amikeco inter la popoloj de la glora Ekvatora Gvineo kaj la glora Ĉinio.” Laŭte kantis la sportistinoj de la Ekvatora Gvineo sub la gvido de la 17-jara sportistino Teresa Nvo Nsang, kiu verkis tiun kanton. Veninte al Pekino, ŝi amikiĝis kun multaj ĉinaj gesportistoj. Ŝi estis kortuŝita de la profunda amikeco inter la popoloj kaj sportistoj de ambaŭ landoj kaj verkis tiun kanton. La Tablotenisa Delegacio de Porto-Riko veninta de la bordo de la Kariba Maro donacis al la geamikoj konkursintaj kun ili pajlĉapelojn kaj alkoholaĵon kun aparta nacia gusto kiel valoran memoraĵon. Porto-rikaj gesportistoj diris: “Post la nuna interkonatiĝo, ni jam fariĝos malnovaj amikoj en la venonta intervidiĝo.” La donacoj alportitaj trans multaj akvoj kaj montoj esprimis profundan amikecon de la Porto-rikaj geamikoj. Ricevintoj de la donacoj diris: “Reveninte al la hejmlando, ni ekmemoros niajn geamikojn en la malproksima Porto-Riko, ĉiufoje kiam ni vidos la pajlĉapelon kaj alkoholaĵon.” Veninte

al Pekino, perua sportistino Fina Salazar amikiĝis kun sudvjetnamaj sportistinoj. Ili ofte varme interparolis, kuraĝigis unu alian, kune rigardis tablotenisan ludon kaj kune kantis, simile al fratinoj. Fina Salazar diris emocie: “Ni vivas en malsamaj lokoj, tamen niaj koroj estas strikte kunligitaj. Nin pli firme kunligu la amikeco inter la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko starigita en Pekino!”

Geamikoj de multaj landoj kaj regionoj de la tri kontinentoj vizitis la Grandan Muron. La majesta pejzaĝo de la impona antikva Granda Muro kaptis la atenton de la vizitantoj. Alexandra Young De Menasche, edzino de la estro de la Panama Tablotenisa Delegacio, diris sincere, ke en la pasinteco ŝi sentis ke inter Panamo kaj la Granda Muro estas tre longa distanco, sed sur la Granda Muro ŝi sentis, ke ili interligiĝas unu kun la alia. Liaj vortoj esprimis la komunan senton de la aliaj geamikoj. Iu meksikia sportistino diris kun profunda sento: “La popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko havas komunajn volon kaj postulojn kaj nia amikeco estas tiel firma kiel la Granda Muro.”

La Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio, Afriko kaj Latinameriko jam finiĝis kun plena sukceso. La semo de tiu ĉi amika turniro certe enradikiĝos, floros kaj donos ankoraŭ pli grandajn fruktojn en la vasta tero de Azio, Afriko kaj Latinameriko.




Nia Vizito al Japanio

de Jelezo, Ĉen Juan kaj Ĝu Mingji

KIAM ni surteriĝis en la Haneda Flughaveno, Tokio, kun bondeziroj kaj amikeco de la ĉina popolo kaj ĉinaj esperantistoj al niaj gastigantoj, ni trovis tre varman akcepton de dekoj da japanaj esperantistoj, kiuj svingis verdajn flagojn kaj entuziasme aplaŭdis, verŝante al ni la profundan amikecon de la japana popolo per Esperanto. Varmaj salutoj kaj bonvenigoj kaj senfinaj manpremoj de maljunuloj kaj junuloj, de viroj kaj virinoj, montris al ni brilajn perspektivojn de kreskantaj amikaj rilatoj inter la du popoloj post la normaligo de la ŝtataj interrilatoj. Inter la bonvenigantoj estis D-ro Egami Fujio, fama japana biokemiisto kaj prezidanto de JEI, S-roj Sakai Matutaro kaj Tokuda

Rokuro. Ili ĉiuj jam vizitis nian landon kaj la du lastaj estas konataj de kaj starigis intiman amikecon kun ĉinaj esperantistoj. Kaj ni renkontis ankaŭ amikojn, kiujn ni nur konis nome, sed ankoraŭ ne persone, kaj ankaŭ multajn junajn amikojn nekonatajn. Aŭgusto estas varma monato en Tokio, precipe ĉi-jare, kaj en la unua vespero de nia alveno al Tokio la varmeco estis pliigita de la ĉiam kreskanta amikeco inter la popoloj de la du landoj. . .

En la dua vespero (la 10-a de aŭg.) kiam ni venis per superekspresa trajno al Kameoka, urbo idilia kaj pitoreska, ĝuste estis okazanta la antaŭkongresa, interkonatiĝa vespero. Kiam ni atingis la kunvene-



La membroj de la Delegacio de la Ĉinaj Esperantistoj kaj S-ro Ito Eizo, prezidanto de la prepara komitato de la Kongreso, kaj japana amiko Tokuda Rokuro

jon sur placo ĉirkaŭita de verdaj arboj kaj freŝaj floroj, tuj leviĝis varma aplaŭdado en la kunveno. Kaj tie ni havis ŝancon renkonti S-rojn Itoo Eizo, Umeda Zenmi kaj Esumi Norija, kiuj estis okupitaj de organizaj aferoj de la Kongreso, kaj peranton de EPĈ S-ron Takenaka Ĝisuke kaj transdoni al ili la elkorajn salutojn de ĉinaj esperantistoj. Ili ĝoje akceptis nin kiel gastojn de ilia 60-a Kongreso por pasigi kun ili tiujn ĝoj- kaj amikeco-plenajn tagojn.

La 11-an de aŭgusto okazis la oficiala inaŭguro de la Kongreso. En la ceremonio Ĵelezo salutis la Kongreson kaj esprimis la koran deziron de la ĉinaj esperantistoj daŭrigi de generacio al generacio la amikajn rilatojn inter la popoloj kaj esperantistoj de ambaŭ landoj.

Dum la tri kongresaj tagoj konsistantaj el sole-naj inaŭguro kaj fermo de la Kongreso, paroladaj kunvenoj, fakkunsidoj, bankedo, akceptado fare de la urbestro . . . ĉie en la kunvenejoj, en la hotelo, en la restoracio kaj en la libroservo regis la amikeca atmosfero inter la ĉina kaj japana popoloj. La Kongreso estis tre sukcesa kaj la nombro de ĝiaj partoprenantoj superis tiun de la 59 antaŭaj. Ĝin partoprenis ne nur veteranaj esperantistoj, sed ankaŭ multaj junuloj flue parolantaj en Esperanto, inkluzive junajn virinojn. En la Kongreso okazis kunsido de EPĈ-legantoj, sub prezido de S-roj Takenaka Ĝisuke kaj Tokuda Rokuro. Pro mult-

nombra partopreno de tiu kunsido, oni devis tri-foje plivastigi la kunsidejon por havigi sufiĉajn sidlokojn. Ĝi estis signifoplena kunsido, kiu montris la subtenon kaj interesigon de niaj japanaj amikoj al EPĈ. La ĉeestantoj kun ĝojo certigis la bonan akcepton de la revuo ĉe japanaj legantoj pro ĝia kontribuo en helpado al ilia kompreno pri la nova Ĉinio, kaj samtempe faris malkaŝajn kaj akrajn kritikojn pri ĝiaj mankoj en elektado de temoj kaj en skribmaniero, kiuj estas tre valoraj kaj konsiderindaj por nia redakcio. Ni esprimas ankoraŭfoje ĉi tie niajn dankojn pro ilia subteno al nia laboro.

Ni neniam forgesos la japanajn amikojn, kiuj estis kun ni en tiuj tagoj kaj venis de oficejoj, laborejoj, liceoj, universitatoj, hospitaloj, firmaoj kaj butikoj . . . ĉiuj kun komuna volo akceli la amikecon kaj harmonian kunvivadon inter la ĉina kaj japana popoloj. En iu kunsido, iu mezaĝa esperantisto transdonis al ni paketon dirante ke li milit-servis kiel soldato por certa tempo en Manĉurio, kaj ke tio estas objekto, kiun li konservis kaj fine trovas ŝancon por doni al ni kiel memoraĵon. Ni trovis ke en la paketo estas flugfolioj kaj bulteno, kiujn la popolaraj trupoj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio disdonis en la Nordoriento dum la militaj jaroj. Kiel japana soldato, li konservis tiujn dokumentojn dum daŭro de pli ol 30 jaroj por fine transdoni propramane al ĉinaj amikoj. La afero havas vere tre profundan signifon!

Fakkunsido de EPĈ-legantoj




Same, ni ne povas forgesi alian esperantiston, kiu venis nin adiaŭi, kiam la Kongreso estis fermita kaj ĉiuj pretis disiri. Tiu amiko diris al ni, ke li venis de malproksima regiono de la lando kaj decidis partopreni la Kongreson, nur kiam li aŭdis ke ĉinaj esperantistoj venos ĉeesti ĝin. Sed dum la kongresaj tagoj, ni estis ĉiam ĉirkaŭitaj de multaj homoj, tiel ke li ne trovis ŝancon por alparoli nin. Kaj la sola frazo, kiun li volis diri al ni, estas: “Bonvolu transdoni niajn bondezirojn al la ĉina popolo.”

En tiu Kongreso ni krome havis ŝancon konatiĝi kun esperantistaj amikoj el Eŭropo kaj Usono. Ili estis fama esperanta poeto el Skotlando S-ro William Auld, la energiĝinta usona amiko S-ro W.R. Harmon, S-ino Elfriede Kruse kaj la foje jam renkontita S-ro Schmidt, ambaŭ el F.R. Germanio, kaj aliaj, kun kiuj ni amike renkontiĝis ĉiutage dum la Kongreso. Dank’ al Esperanto ni starigis ponton de interkompreno kaj amikajn rilatojn.

La prezidanto de la organiza komitato de la Kongreso S-ro Itoo afable nin gvidis dum nia vizito al Kioto kaj Nara, la famaj malnovaj ĉefurboj de Japanio. La historiaj lokoj kaj kulturaj objektoj en tiuj du urboj registras la amikajn rilatojn inter la ĉina kaj japana popoloj dum du jarmiloj, kiuj nepre daŭros plue de generacio al generacio!

Antaŭ la fermo de la Kongreso, diverslokaj reprezentantoj jam prezentis al ni la inviton, ke ni vizitu iliajn lokojn post la Kongreso, insistante ke la esperantistoj de la respektivaj lokoj malpacience tion atendas. Bedaŭrinde ni ne disponis sufiĉan tempon kaj, laŭplane, povis nur resti unu-du tagojn en iu loko sur la revena vojo de Kameoka al Tokio, kvankam estis por ni tre malfacile malakcepti tiel kortuŝajn afablajn invitojn. La japanaj amikoj kompreneble konsentis al ni, kompreneble ne sen bedaŭro, dirante: “Do, vizitu nin en venonta fojo!” Post la interkonsiliĝo de la japanaj amikoj, estis aranĝite ke ni vizitos Nagoja-n laŭ la invito de Tokai Esperanto-Ligo kaj pasigis tie unu tagnokton neforgeseblan por ni. Kun dankemo ni vizitis la hejmon de S-ro Takenaka Ĝisuke, peranto de EPCĈ, kaj rigardis lian riĉan bibliotekon kaj la binditajn jarkolektojn de EPCĈ. Li akceptis nin treege intime kaj varme. Poste ni ĉeestis vespere la bonvenigan kunvenon aranĝitan por ni de la Tokai Esperanto-Ligo. Estis poeto, dommastrino, ĥemia analizisto, universitata asistanto, poŝtestro, sekretariino, oficisto, studento kaj la neforgesebla, vigla organizanto de la kunveno S-ro Niva Masahisa, kiuj eldiris sincerajn vortojn por esprimi sian profundan ami-



Libroservo de la Kongreso

kecon kaj bonvolon al la ĉina popolo. Ni estas tre ĝojaj havi la honoron transdoni tiun profundan amikan senton de la japana popolo al la ĉina.

Nia aktivado en Tokio estis la zenito, sed ne la fina punkto de nia pli-ol-dektaga vivado en Japanio — aldoniĝis de nun nova kanalo por amikaj rilatoj inter niaj du popoloj: Esperanto. Ni vizitis la sidejojn de la Japana-Ĉina Amikeca Asocio (Ortodoksa) kaj de la Asocio de Kulturaj Interŝanĝoj inter Japanio kaj Ĉinio kaj intervidiĝis kun la estimataj S-roj Toki Zenmaro, Nakazima Kenzo kaj Mijazaki Seimin. La unua estas ankaŭ veterana esperantisto en Japanio. Ni vizitis ankaŭ JEI, kiu funkcias kontinue jam de pli ol duonjarcento. Ĝi aranĝis festenon por ni, en kiu ĝia prezidanto D-ro Egami Fujio kaj Ĵelezo faris paroladojn, esperante ĉiam plivastigi de nun la kanalon de amika interrilato. Fraŭlino Tanaka Joŝino, aktivulino de la Esperanta Virina Asocio, prezentis al ĉiu el ni bukedon da freŝaj floroj, kiu simbolis la florantan amikecon inter niaj popoloj. Kun la familio de S-ro Iŝiguro Teruhigo kaj aliaj amikoj novaj kaj malnovaj, ni pasigis tre agrablan vesperon.

Matene de la 23-a, aŭgusto, ni forlasis Tokion por reveni al la patrolando, kunportante la profundan amikecon de la japana popolo kaj la japanaj esperantistoj. En la Haneda Flughaveno nin adiaŭis S-ro Itoo, kiu venis speciale de Kameoka, S-ro Jasui de la Orienta Librejo, S-ino Abe Kimi kaj aliaj amikoj. Ilia afableco ankoraŭfoje certigas al ni, ke la amikeco inter la du popoloj estas tre profunda.

Esperantaj Novaĵoj

LA 60-A KONGRESO DE JAPANAJ ESPERANTISTOJ OKAZIS EN KAMEOKA

La Kongreso daŭris de la 11-a ĝis la 13-a de aŭgusto ĉi-jare kun aliĝo de pli ol 900 esperantistoj, rekorda en la historio. Inter la kongresanoj troviĝis gastoj el Usono, Britio, Francio, F. R. Germanio, Svedio kaj Ĉinio. Post la solena inaŭguro de la Kongreso okazis fakkunsidoj, bankedo, urbestra akcepto, filmovespero, urbana kunveno pri la utiloj de Esperanto. La diverslandaj esperantistoj amike interrilatiĝis, intime ŝanĝis inter si opiniojn pri diversaj problemoj, kaj plifortigis la interkomprenon kaj amikecon inter diverslandaj popoloj.

K-DOJ ĴELEZO K.A. RAPORTIS PRI SIA VIZITO AL JAPANIO

Laŭ invito de japanaj esperantistoj, tri ĉinaj esperantistoj, nome k-doj Ĵelezo, Ĉen Juan kaj Ĝu Mingji, partoprenis la 60-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj en Kameoka. Ili veturis al Japanio la 8-an de aŭgusto kaj revenis kunportante la profundan amikecon de la japana popolo kaj japanaj esperantistoj, la 23-an de la sama monato.

La 13-an de septembro okazis en Pekino kunveno sub la prezido de k-do Hujucz, prezidanto de ĈEL, en kiu k-doj Ĵelezo k.a. detale raportis al la lokaj esperantistoj pri sia vizito al Japanio. La ĉeestantaro tre ĝojis pri ilia sukcesa vizito kaj montris sian pretecon energie labori por plifortigi la amikecon inter la popoloj kaj esperantistoj de la du landoj kaj tiun kun aliaj landoj pere de Esperanto.

Kamarado Ĵelezo faras paroladon je la inaŭguro de la Kongreso.



KAMBOĜO EN BATALO

EN la kuranta jaro, la patriota armeo kaj popolo de Kamboĝo faris fortan ofensivon sur ĉiuj batakampoj kontraŭ la malamiko kaj donis pezajn batojn al la naciperfida kliko de Lon Nol, kiu jam falis en firman sieĝon de la vasta kamboĝa popolo kaj vizaĝas al la fatalo de plena pereco. En sia batalado, la patriota armeo kaj popolo de Kamboĝo komponis per sia agado multajn heroajn kantojn.

BATALO SUR MEKONGO

En majo de la kuranta jaro, X-trupo de la Naciliberigaj Popolaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo garnizonanta borde de Mekongo ricevis ordonon ataki malamikan ŝiparon, kiu transportos provianton al Pnompeno. La batalantoj de la trupo decidis bone fari la batalon sub kunagado de frata trupo, rompi la surakvan trafikon de la malamiko kaj meti en teruran izolecon la naciperfidan klikon de Lon Nol, kiu kuntiriĝis testude en Pnompeno.

X-trupo elektis Dei Dos kiel terenon por la batalo, ĉar tie la rivero estas mallarĝa kaj la trapasantaj ŝipoj nepre devas malrapidiĝi en tiu loko.

Post forigo de fortikigitaj punktoj de la malamiko sur la bordoj de Mekongo kaj liberigo de Chrak Cres, la Naciliberigaj Armitaj Fortoj jam metis la regionon Dei Dos sub sian plenan regadon. X-trupo jam ŝtele transportis armilojn en la batalkampon kaj la batalantoj estis bone pretaj por atendi la alvenon de la malamika ŝiparo.

Post noktiĝo de la 6-a, du malamikaj militŝipoj malrapide veturis kontraŭ la fluo por provi kaj elhaki naviglinion por la ŝiparo. Travidinte la ruzon de la malamiko, la kaŝiĝintaj batalantoj de la Naciliberigaj Armitaj Fortoj intence lasis ilin trapasi. Iom poste, la batalantoj ricevis informon, ke la malamika ŝiparo jam alproksimiĝis al Dei

Dos. Tiam la aviadiloj B-52 eskortantaj la ŝiparon komencis bombadi la bordojn kaj rekognoskaj aviadiloj de la malamiko ĵetis lumigajn bombojn unu post alia. Sed ĉio tio neniom povis ŝanceli la memfidon de batalpretaj soldatoj pri certa venko.


Frumatene je la tria, aŭdiĝis eksplodo en malproksimo. Tio estis signalo de atako. La malamikoj estingis ĉiujn lamplumojn sur la ŝipoj kaj intencis forfuĝi. X-trupo komencis pafi. Du obusoj trafis la plej grandan petrolan cisternŝipon. Tuj eksplodis la malamika ŝipo kaj rapide dronis ellasante nigrajn fumkolonojn. Intense bombardate de la Naciliberigaj Armitaj Fortoj, la malamikaj ŝipoj klopodis ĉiamaniere por eviti la batojn de la popolaj armitaj fortoj kaj fari kontraŭatakon. Iuj el la malamikaj aviadiloj estis faligitaj kaj la ceteraj ne kuraĝis plu flugi malalte.

La popolaj soldatoj batalis pli kaj pli brave kaj furioze pafadis al la malamikoj. Obusoj bone trafis la celaĵojn. Unu eskorta boato estis trafita de obuso kaj komencis bruli, alia ŝipo kun nacia standardo de suda Koreio, plensarĝita per municio, eksplodadis dum pli ol unu horo. Ankaŭ kelkaj aliaj ŝipoj estis trafitaj, el kiuj iuj baldaŭ dronis kaj aliaj flosis brulante kaj ellasante densan fumon. Preskaŭ ĉiuj malamikoj sur la dronigitaj ŝipoj estis ekstermitaj.

En tiu brila batalo, la Naciliberigaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo dronigis kaj forbruligis 5 ŝipojn, serioze difektis 6 ŝipojn, faligis 2 aviadilojn kaj difektis du aviadilojn de la malamiko.

NEESKAPEBLA STATO

Nokte de la 29-a de junio, diversaj trupoj de la Naciliberigaj Popolaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo eniris unu post alia la postenojn por ataki la forti-



Artilerianoj de la Naciliberegaj Popolaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo sur sia posteno

kigitan punkton ĉe Prek Kdan de la pupa armeo sur la orienta bordo de la rivero Tonle Sat.

Je la tria horo frumatene de la 30-a de junio, obusoj flugis de ĉiuj direktoj al la fortikigita punkto de la pupa armeo. La malamikoj konfuziĝis sub la furioza atako. Aŭdinte la tondran bombardadon, la kamparanoj loĝantaj en la ĉirkaŭaĵo sciis, ke la popolaj armitaj fortoj komencis ataki Prek Kdan. Multaj el ili meminciate organizis sin kaj prenis serpojn, hakilojn kaj bastonojn kiel armilojn por kapti fuĝantajn malamikojn.

En intensa batalo, la popolaj armitaj fortoj ekstermis pli ol 250 malamikojn. Multaj soldatoj de la pupa armeo sukcesis eskapi el la sieĝo, tamen la timigitaj fuĝantoj senarmilaj baldaŭ estis kaptitaj de kamparanoj. Iuj el ili demetis sian militistan uniformon kaj naĝis tutforte al la kontraŭa bordo de Tonle Sat; aliaj prenis perforte boatojn de tieaj loĝantoj kaj klopodis remi al la okcidenta bordo. Sed ili denove ricevis atakon de embuskanta trupo de la popolaj armitaj fortoj. Ankaŭ la du barĝoj venigitaj de la malamiko por kolekti siajn fuĝantajn soldatojn estis trafitaj de kanonoj de la popolaj armitaj fortoj kaj fariĝis du flamantaj masoj sur la rivero.

Post elkrepuskiĝo, gerilanoj kaj kamparanoj rapidis al la orienta bordo de Tonle Sat proksime de Prek Kdan. Tie kuŝis dise vunditaj kaj mortigitaj soldatoj kaj uniformoj, armiloj kaj municio faritaj de Usono, kiujn la puparmeanoj formetis antaŭ sinĵeto en la riveron. La gerilanoj kaj kam-

paranoj kune kolektis la trofeon sur la batalkampo kaj ĝoje portis ilin surŝultre aŭ duope al la loka organizo de la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo.

Sur la okcidenta bordo ankoraŭ iris batalo por kapti la disfuĝantajn malamikojn. Grupo da malamikaj soldatoj, kiuj sukcesis naĝi al la okcidenta bordo, sin kaŝis en herbaro ĉe la bordo, kun la vana espero eviti la serĉantajn batalantojn de la popolaj armitaj fortoj kaj kamparanoj. Matene, kiam du infanoj de kamparanoj iris al la rivero por ĉerpi akvon, ili vidis, ke fuĝintaj malamikoj kaŝiĝis tie. La sagacaj knaboj tuj kuris kaj raportis tion al la gerila trupo. La gerilanoj rapidis tien kaj kaptis la malamikojn. Alia grupo da malamikaj soldatoj eniris la embuskan cirklon de la popolaj armitaj fortoj post transnaĝo de Tonle Sat kaj estis kaptitaj.

La batalo rapide finiĝis. La fortikigita punkto ĉe Prek Kdan estis forigita kaj neniu el la malamikoj garnizonantaj tie sukcesis forfuĝi.

KURIERINO

Iutage, la komunika grupo de KH-vilaĝo en la liberigita regiono de Takeo-provinco ricevis taskon porti gravan leteron al H-vilaĝo, por kion fari oni devis trairi la fortikigitan punkton de la malamiko ĉe Prey Sandek. La estrino de la komunika grupo Sam, filino de malriĉa kamparano, meminciate prenis sur sin la taskon.

Matene Sam ekmarŝis. Ŝi iris tra vilaĝo kaj arbaro kaj baldaŭ alproksimiĝis al la fortikigita punkto de la malamiko. Kiam ŝi estis ĉ. 500 metrojn for de la fortikigita punkto, ŝi singardeme haltis kaj pririgardis ĉirkaŭen. Timante surprizatakon de la popolaj armitaj fortoj, la malamikoj sin kaŝis en la fortikigita punkto. Sam rapidege preterpasis ĝin. Ĉio restis kvietaj kaj Sam sentis koran ĝojon. Daŭre irinte 4 horojn, Sam sekure atingis H-vilaĝon kaj donis la gravan leteron al la respondeculo de la komunika stacio.

Apenaŭ Sam sidiĝis por iom ripozi kaj reveni post tagmanĝo, la respondeculo de la komunika stacio diris al ŝi, ke estas urĝa tasko, nome ŝi devas porti leteron al KH-vilaĝo, kaj nepre sekure. Sam sciis, ke la tasko estis urĝa kaj grava, do ŝi tuj adiaŭis la kunbatalantojn.

Baldaŭ ŝi denove atingis la fortikigitan punkton de la malamiko. Por eviti neatenditan okazaĵon, Sam refoje kontrolis la leteron kaj metis en siajn du poŝojn plenmanojn da sablo por eventuala bezono en batalo kontraŭ malamikoj. Ĉe vojkrucio ŝi subite renkontis du armitajn pupajn soldatojn kaj

jam ne povis eviti ilin. Rimarkinte ke antaŭ ili troviĝis homo, ili ektimegis kaj tuj levis sian pafilon. Sed kiam ili rekonis, ke tiu estis junulino, ili tuj interŝanĝis okulsignon kaj iris al Sam kun fiintenco. En tiu danĝera situacio, Sam plena de malamo kontraŭ la malamiko daŭre antaŭeniris grandpaŝe. Kiam la puparmeanoj proksimiĝis al ŝi, Sam subite elprenis du plenmanojn da sablo kaj ĵetis tion al la vizaĝo de ili. La malamikoj ne povis malfermi siajn okulojn kaj provis ilin viŝi per la manoj. Profitante tiun ŝancon, Sam sin ĵetis al ili kaj deprenis la pafilon de unu el ili. Ŝi direktis la pafilon al ili kaj kriis: "Levu la manojn! Ne moviĝu!" La malamikoj obeeme faris laŭ ŝia ordono. Sam deprenis ankaŭ la pafilon de la alia kaj ordonis: "Dorsen! Marŝ!" Kaj ŝi avertis ilin aldone: "Zorgu vian kapon, se vi malobeos." La malamikaj soldatoj timtremadis. Eskortante la du kaptitojn, Sam revenis al KH-vilaĝo post kelkaj horoj.

De tiam disvastiĝis inter la armeanoj kaj popolanoj la historio pri la kupto de du malamikoj fare de Sam kaj ĉiuj volas lerni ŝian revolucionan spiriton.

Soldatoj de la loka trupo de NPAFK en marŝo



NOVAJ SCIENC-EDUKAJ

FILMOJ

EN la Granda Proleta Kultura Revolucio, nia lando faris multajn scienc-edukajn filmojn.

La enhavo de tiuj filmoj spegulas la tri grandajn revoluciajn movadojn de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado. La filmo "Adiaŭ, Dio de Pesto" malkovras parazitisman leĝon de skistosomo kaj prezentas kelkajn efikajn metodojn de preventado kaj ekstermado. Ĉar ĝi strikte rilatas kun sano de la popolo, tial ĝi ricevas grandan aprobon. La filmo "Forstumado sur montoj por konservi akvon kaj teron" ludas grandan rolon en ŝanĝo de natura kaj produkta fizionomio en la vasta nordokcidenta regiono de nia lando. Ankaŭ la filmo "Nova teknologio de prema prilaboro", "Sinteza lano" kaj aliaj scienc-edukaj filmoj ricevis bonan akcepton de vastaj amasoj. Rigardinte tiujn filmojn, spektantoj akiris ne nur novajn sciencajn sciojn, sed ankaŭ edifon kaj instigon por antaŭenpuŝi disvolviĝon de produkto.

La filmo "Kampoj de Daĝaj", kiu prezentas terkulturadon per scienca metodo fare de la progresinta Daĝaj-brigado de Hijang-gubernio, Ŝanhj-provinco, estis projekciata en la vasta kamparo kaj akcelas amasan sciencajn eksperimentadon sur la agrikultura fronto de nia lando. Gvidantoj de diversaj niveloj kaj komunumanoj de nia kamparo lernas ne nur revolucionan spiriton de penema lukto kontraŭ malfaciloj kaj sinapogo sur la propraj fortoj, sed ankaŭ sciencajn sintenon de Daĝajanoj. Vidinte la filmon, kadroj kaj komunumanoj de Heĝang-gubernio de Gujĝoŭ-provinco denove reviziis sian projekton de reformo de montoj kaj riveroj. En la lastaj tri jaroj tiu gubernio gajnis sinsekvajn riĉrikoltojn en agrikulturo.

Tiuj filmoj pli multe reliefigas revolucionan spiriton kaj kreivon de laboristoj kaj kamparanoj — mastroj de scienco kaj tekniko. La filmo "Generigi

burdojn por ekstermi fiinsektojn" rakontas, kiel komunumanoj de Liangiang-gubernio de Guangdong-provinco preventas kaj ekstermas fiinsektojn de rizo kune kun laborantoj de la provinca biologia taĉmento. La filmo per populara klarigo kaj bildoj montras leĝon de kreskado kaj vivado de ruĝokula burdo (*Trichogramma evanescens*) kaj folivolva insekto (*Parnara guttata*). Ĝi rakontas, kiel ovo de la burdo parazitigas en ovo de la fiinsekto kaj kiel oni ekstermas per tia metodo la lastan antaŭ ĝia eloviĝo. La filmo ankaŭ konigas al la rigardantoj la tutan procedon de generado de la burdo ĝis ekstermado de la fiinsekto. Dum la tuta procedo sciencaj laborantoj strikte kombinis sin kun praktiko, faris sian esploron konforme al lokaj kondiĉoj kaj trovis leĝon de ekstermado de fiinsekto per insekto. Per simplaj bildoj de ŝutado de insekticido, kolektado de insektaj ovoj, observado kaj eksperimentado en la laboratorio, la filmo montras, ke la laboranta popolo kun riĉa sperto kaj sciencistoj sin kombinantaj kun la antaŭa estas vera mastro de scienco kaj tekniko.

Ĉi tiuj filmoj kaptas la esencon de objektoj kaj eksplikas ĝin prenante la ĉefan kontraŭdiron kiel elirpunkton, tial spektantoj ricevas scion kaj edukon. La filmo "Replanto de derompitaj membroj" montras komplikajn kontraŭdirajn procezojn. Post replantiĝo de derompitaj membroj, ekzistas multaj kontraŭdiroj, ekzemple nekrozo de karno, detruigi de sangaj angioj kaj bakteria infekto, sed la ĉefa kontraŭdiro estas sangflua ekvilibro de arterio kaj vejno. En la komenco, kuracistoj de la Sesa Popola Hospitalo de Ŝanhajo forigis ŝveliĝon post replantigo de derompitaj membroj aplikante pasivan metodon de tranĉo de la haŭto ĉe pluraj lokoj. Post la analizado la kuracistoj solvis la problemon de ŝveliĝo kaj multe altigis la reviviĝan pocenton de replantitaj membroj. La filmo havas sciencajn enhavon kaj facile akcepteblan artan efikon.



SALA-NACIO kun pli ol 40,000 membroj loĝas ĉefe en la provincoj Kinghaj kaj Gansu de la nordokcidenta Ĉinio. El ili pli ol 35,000 sala-anoj koncentriĝas en la Hjunhua-a Sala-nacia Aŭtonoma Gubernio de Kinghaj-provinco. Ili longtempe vivas mikse kun hanoj, tibetanoj kaj hujoj, kune laboras kaj havas intiman rilaton kun ili en ekonomio kaj kulturo.

En longa kunvivado de la sala-anoj kun hanoj, tibetanoj kaj hujoj, la sala-lingvo ensorbis multajn vortojn de la hana kaj tibeta lingvoj. Sala-nacio havas riĉan parolan literaturon, kaj la deveno de Sala-nacio konserviĝas en la tradiciaj rakontoj. Ĝi ne havas skriblingvon kaj kutime uzas hanan skriblingvon.

La sala-anoj okupiĝas pri agrikulturo, ĉefe pri kulturado de tritiko kaj sekalo. Ili donas atenton ankaŭ al disvolvo de hortikulturo, kaj la kajena pipro (*Zanthoxylum simulans*) kaj nukso produktitaj de Hjunhua-gubernio estas fame konataj tra la tuta lando.

Oni diras, ke antaŭ tre longa tempo praavoj de sala-anoj, por serĉi edenon, venis al la piedo de la monto Giŝi apud la Flava Rivero post multa klopodo kaj fikse loĝadis en Hjunhua. Kune kun la gefratoj de aliaj nacioj ili kulturebligis la teron apud la Flava Rivero. La sala-anoj terure suferis en la obskura malnova socio. Dum sia regado kuomintangaj reakciuloj trudis al la sala-anoj pli ol 40 specojn da impostoj, kaj la laborantaj popolanoj vivis en senfunda mizero. La penige ekspluatitaj agroj kaj fositaj kanaloj estis plejparte forrabitaj de bienuloj kaj temploj. La kuomintangaj reakciuloj, feŭdaj kapoj kaj religiaj superuloj faris komploton inter si por senĉese instigi malpaciĝon kaj malaman murdon inter la nacioj kaj religiaj sektoj. En 40 jaroj antaŭ la Liberiĝo, en Hjunhua okazis pli ol 130 grandskalaj armitaj bataloj, en kiuj multaj sala-anoj mortis aŭ perdis sian familion.

Post la Liberiĝo la sala-anoj liberiĝis el la mizero kaj havas luman vivon. La Partio kaj ŝtato rapide donis al ili monhelpon aŭ pruntmonon por helpi ilin en la restarigo de produktado kaj aranĝo

de la vivo. En la socialismaj revolucio kaj konstruado, la diligentaj kaj kuraĝaj sala-anoj humile lernas de Daĝaj en agrikulturo kune kun la diversnaciaj gefratoj, tiel ke la gubernio akiris sinsekvajn riĉrikoltojn de greno kaj rapidan disvolviĝon ankaŭ en iliaj brutobredado, forstumado kaj flankaj okupoj. La gubernio starigis malgrandajn muelejojn kaj fabrikojn de agrikulturiloj, elektro kaj konstruaj materialoj. Sub helpo de la ŝtato Hjunhua-gubernio konstruis elektrejojn Huangfeng. Ankaŭ ĝiaj popolkomunumoj kaj produktaj brigadoj konstruis malgrandajn hidroelektrejojn. Nun la sala-anoj havas elektrajn lampojn en sia domo, kaj popolkomunumoj kaj brigadoj elektrizis multajn laborojn de agrikultura produktado.

La Flava Rivero fluas tra la gubernio, sed ĝi ne povis irigacii kampojn pro troa malalteco de la riverlito. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio la sala-anoj decidis venki la naturon. Vintre de 1957, la popolo de la gubernio fosis la kanalon Huangfeng longan je 20 km. kaj la irigaciajn konstruaĵojn de Mengdaŝan kaj Duoŝize. De tiam la sala-anoj irigacias siajn kampojn per la akvo de la Flava Rivero.

Hjunhua-gubernio havas belan nomon de frukta ĝardeno sur Kinghaj-altebenaĵo. La sala-anoj aktive produktas grenon kaj samtempe disvolvas plurspecan mastrumadon. Ili kulturis fruktajn ĝardenojn sur montdeklivoj. Komence de 1966, per pli ol centmil labortagoj Suĝi-brigado kreis ĝardenon kun pli ol 6,000 fruktarboj kaj kontraŭventan zonon el pli ol 3,000 arboj, formovinte pli ol 400,000 kubmetrojn da teraĵo. La komunumanoj de Ŝankeva-brigado per granda penado plantis multajn arbojn de kajena pipro kaj nukso en ŝtuparaj kampoj. La sala-anoj klopodas por ŝanĝi la naturan fizionomion de Hjunhua-gubernio per la diligentaj manoj. En la lastaj du jaroj, la gubernio kulturis fruktajn ĝardenojn kaj kampojn de farmaciaj vegetaloj kun totala areo de 193 hektaroj. La disvolviĝo de plurspeca mastrumado fortigis la kolektivan ekonomion de komunumoj. Antaŭ la jaro 1967, la gubernio havis malmultajn agrikulturajn maŝinojn, sed nun ĝi multe uzas ilin en agrikultura produktado.



Jihetuan-movado

de DONG FANGHIAŬ


EN la jaro 1900 eksplodis Jihetuan-movado kva-zaŭ ŝtormo super la tero de Ĉinio. Ĝi estis patriota armita batalo rezultinta el la ĉiam pli profundiĝanta invado de imperiistoj kaj senprecedence granda mizereco de la nacio, kaj ankaŭ estis ĝenerala kuniĝo de la sinsekvaj bataloj de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo dum longa periodo.

En la lastaj jaroj de la 19-a jarcento, la imperiisma agresado kontraŭ Ĉinio profundiĝis paŝo post paŝo, precipe post la Ĉina-Japana Milito en 1894, la imperiismaj landoj senskrupule rabokupis por si "koncesiojn" kaj dividis "influserojn" por fine disdivide aneksi Ĉinion.

En tiuj cirkonstancoj, Ŝandong-provinco alfrontis la plej fortan minacon. Dum la Ĉina-Japana Milito, la japanaj agresantoj jam faris senbridajn atakojn kontraŭ Ŝandong-duoninsulo. Poste Germanio perforte okupis Giaŭĝou-golfon kaj

Britio la havenon Vejhajvej, tiel ke la du gravaj havenoj de Ŝandong falis sub ilia superregado, kaj Germanio plie prenis la tutan provincon Ŝandong kiel sian influferon. Misiistoj kiel pioniroj de imperiisma invado penetrigis ĉie en la provincon kunage kun la agresaj dispozicioj de imperiismo kaj portis al la popolanoj senfinajn suferojn. Tiu-tempe preĝejoj estis starigitaj en multaj urboj (inkluzive tiujn de gubernioj) de Ŝandong. La grandnombraj misiistoj sub la komando de imperiismaj elementoj en eklezioj ŝtele kolektis informojn, rabokupis teron, eĉ mortigis kaj tiel plu. Kaj diversnivelaĵoj de la registaro de King-dinastio (1644-1911) staris ĉe la flanko de la eklezioj kaj kruele subpremis laborantajn amasojn. Barakanta sur la morta linio, la ĉina popolo trovis nenian alian vojon ol ekpreni armilojn por batali kontraŭ la reakciaj fortoj interna kaj ekstera. Tial je la lastaj jaroj de la 19-a jarcento leviĝis unue en Ŝandong la bataloj de la ĉina popolo kontraŭ la fremdlandaj misiistoj kaj tiel ekbrulis la fajrego de Jihetuan-movado.

Armiloj uzitaj de Jihetuan



Jihetuan komence nomiĝis Jiheĉjuan, kiu estis sekreta societo kontraŭ King-dinastio kun forte mistera koloro, kaj kies membroj kiel fame konate ekzercis sin per luktarto per *ĉjuan* (pugno) kaj bastono. Poste kun la profundiĝo de imperiismaj agresaj fortoj en Ĉinion senprecedence akriĝis la naciaj kontraŭdiroj, ĝia lancpinto de batalo sin turnis pli kaj pli al imperiistoj kaj ĝi turniĝis en publikan organizon kun la nova nomo Jihetuan por kunigi la amasojn en batalado kontraŭ imperiismo.

La leviĝo de Jihetuan-movado en Ŝandong multe konsternis la imperiistojn. La diverslandaj legacioj en Pekino senĉese instigis la registaron de King-dinastio ekpreni subpremajn paŝojn kontraŭ Jihetuan. En decembro de 1899, la registaro de King-dinastio promociis Juan Ŝikaj, la kontraŭrevolucion ekzekutiston, kiel estron de Ŝandong-provinco por ekstermi Jihetuan-movadon. La kruela sub-

premo de Juan Ŝikaj pliindignigis la lokajn popolanojn. Subtenante unu al la alia Jihetuan-aj organizoj de la diversaj lokoj brave batalis kontraŭ Juan Ŝikaj kaj batis samtempe la imperiismajn agresfortojn.

Por plibone disvolvi la revoluciajn fortojn kaj la batalon kontraŭ agreso, Jihetuan eniris de Ŝandong en Hebej-provincon en printempo de 1900 kaj kunfluiĝis kun la tieaj Jihetuan-organizoj. La vastaj amasoj de malriĉaj kamparanoj, transportistoj ambaŭborde de la Granda Kanalo kaj urbaj laboruloj aliĝis al la vicoj de Jihetuan; ankaŭ virinoj sin organizis en la societoj Hongdenĝaŭ k.a. kaj brave partoprenis en la batalo. En somero de tiu jaro, Jihetuan eniris en Pekinon kaj Tiangin kaj superregis la kernan lokon de King-dinastio. Tuj poste la militaj flagoj de Jihetuan flirts en la aero interne kaj ekstere de la Granda Muro; miloj kaj dekmiloj da popolanoj en la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero formiĝis en senprecedence potenca ŝtormo kontraŭimperiisman, kaj perturbis la duonkolonian regadon truditan de imperiismo al Ĉinio.

Frue dum ekleviĝo de Jihetuan-movado la diverslandaj imperiistoj jam alianciĝis por subpremi ĝin. En la periodo de januaro ĝis aprilo, 1900, la legacioj de Usono, Britio, Germanio, Francio kaj Italio en Ĉinio plurfoje postulis per notoj ke la registaro de King-dinastio rigore subpremu Jihetuan, kaj minace sendis militŝipojn al Dagu. En majo King-dinastio ordonis al generalo Jang Futong subpremi Jihetuan per trupoj en Hebej-provinco. Tamen en batalo ĉe Lajŝuj la King-armeo estis plene venkita kaj Jang Futong mortigita, tiel ke la batalflamo de Jihetuan pli ardis ol antaŭe.

Vidante ke la registaro de King-dinastio jam ne povas superregi la situacion, en junio la ok potencoj Britio, Germanio, Rusio, Francio, Usono, Japanio, Italio kaj Aŭstrio formis agresan aliancan armeon kun 2,000 personoj, kiu, sub la komando de la angla vicadmiralulo Edward Hobart Seymour, militmarŝis de Tiangin al Pekino pretekstante protekti la legaciojn. Survoje la agresa armeo renkontis fortan rebaton de Jihetuan,

tiel ke ĝi devis sin retiri al Tiangin en konsterno.

Antaŭ kaj post tio Jihetuan kaj parto de la patriotaj King-trupoj sange luktis kontraŭ la imperiismaj agresantoj ankaŭ ĉe Zigulin en Tiangin kaj ĉe legacia kvartalo de Donggiaŭminhiang en Pekino, kaj la agresantoj ricevis fortajn batojn en la bataloj.

La potenco de Jihetuan en Pekino kaj Tiangin fariĝis granda minaco al la putra registaro de King-dinastio. Por eviti la lancpinton de Jihetuan kaj samtempe ne ofendi la imperiistojn, la imperiestra patrino Cihi alprenis kontraŭrevolucionan duvizaĝan taktikon de falsa subteno kaj vera perfido al Jihetuan: unuflanke, ŝi “deklarigis militon” kontraŭ la

Jihetuan-anoj brave batas la agresantojn.




imperiismaj landoj, ŝajnigante sin staranta ĉe la flanko de Jihetuan; kaj aliaflanke, ŝi komplotis kun la imperiistoj por amasbuĉi Jihetuan-anojn per la manoj de la imperiistoj. Kiam la imperiismaj potencoj refoje koncentris siajn trupojn ĉe Dagu-koŭ, kaj de tie marŝis al Tiangin-a koncesio por ataki la urbon Tiangin, la registaro de King-dinastio sekrete ordonis al siaj armeaj ĉefoj en Tiangin ke ili postenigu Jihetuan en la plej fronto kaj ataku ĝin de dorso dum batalo. Pro tio Jihetuan suferis grandan perdon. Tiel Tiangin falis en la 14-a de julio. Post nelonge la agresantoj atakis Pekinon. King-armeo en Pekino forkuris de la urbo jam antaŭ ol la agresantoj atingis ĝin. Sed Jihetuan brave batalis kontraŭ la agresantoj kaj, eĉ kiam la malamikoj jam eniris en Pekinon, la bravuloj ankoraŭ persiste daŭrigis la batalon sur stratoj kaj stratoj.

Okupinte Pekinon kaj Tiangin, la agresantoj ĉie faris mortigojn, bruligojn, rabadojn, seksatencojn k.a. La imperiismaj potencoj plie okupis teritoriojn profitante la okazon, precipe la Carisma Rusio, kiu kun senbrida ambicio sendis en julio siajn trupojn de diversaj direktoj por invadi la Nordorienton de nia lando pretekstante protekti fervojon de si konstruatan, kaj en oktobro preskaŭ la tuta Nordoriento estis okupita de ĝi.

Cihi, la perfidanto de la nacio, tiam demetis sian maskon kaj, por plaĉi al la imperiistoj, dekretis al siaj oficiroj kaj soldatoj de diversaj lokoj ke ili nepre ekstermu plene Jihetuan-anojn.

Kvankam la imperiismo kaj ĝia lakeo, la registaro de King-dinastio, kune subpremis la ĉefan forton de Jihetuan, tamen Jihetuan ankoraŭ brave kaj obstine persistis en la armita batalo kontraŭ la imperiismo kaj feŭdismo. En 1901, kiam la registaro de King-dinastio kapitulacis genuflekse al la imperiismo kaj subskribis la naciperfidan Traktaton de 1901, la popolanoj de diversaj lokoj en Hebej refoje levis la standardon de "forbalao de King-dinastio kaj ekstermo de la agresantoj" kaj ĝismorte batalis kontraŭ la malamikoj.

Same kiel la aliaj revoluciaj bataloj en la ĉina historio, Jihetuan-movado elmontris la neflekseblan batal-spiriton de la ĉina popolo en rezistado kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Ĝi regalis la imperiistojn per la fera pugno de la ĉina popolo kaj frakasis ilian obscedan sonĝon pri interdivido de Ĉinio. La revoluciaj meritoj de Jihetuan kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo brilos por ĉiam en la ĉina historio.



RIĈA RIKOLTO DE KOLZOSEMOJ KAJ TABAKO

Ĉi-jare Hebej-provinco akiris riĉan rikolton de kolzosemoj post la venko de serioza sekegeco. Ĝia totala produktokvanto plimultiĝis je pli ol 80% ol tiu de la pasinta jaro kaj meznombra pohektara produktokvanto je 10-20%. Hjuĉang-subprovinco de Henan, la fama tabakoproduktejo de nia lando, akiris riĉan rikolton de pli ol 53,333 hektaroj da tabako. Ĝiaj totala kaj meznombra pohektara produktokvantoj kreskis respektive je 22% kaj 15% ol tiuj de la pasinta jaro kaj kreis rekordon en la historio. Kaj ankaŭ ĝia kvalito superis tiun de la pasintaj jaroj.

ĜENERALA MEZURO DE GEOMAGNETO

La ĝenerala mezuro de geomagneto estas la grava laboro en la studo pri geomagneta kampo. Antaŭ la Liberiĝo tiu laboro estis farata plejparte de imperiismaj agresantoj. Post la Liberiĝo, la geomagneta sekcio estas starigita en la Geofizika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Ekde la jaro 1950 ĝi faris geomagnetan mezuradon sinsekve en iuj lokoj, kaj desegnis kaj eldonis du numerojn de ŝtata geomagneta mapo de la jaroj 1950.0 kaj 1960.0.

Puŝate de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la Geofizika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj organizis specialan grupon en la jaro 1969, kiu komencis ĝeneralan geomagnetan mezuradon tra la tuta lando helpate de koncernaj unuoj kaj ĝis 1972 plenumis mezuradon pri absoluta valoro de tri ĉefaj esencoj de geomagneto en preskaŭ 2,000 punktoj kaj grandan kvanton da koncernaj astronomiaj mezuroj. En la ĝenerala mezurado la grupo atentis la unuecan normon de precizeco kaj racian dispozicion de la punktoj. La meznombra denseco de la dispoziciaj punktoj estas ĉ. 5,000 kvadrataj kilometroj.

Novaj Ĉinaj Esperantaj Eldonaĵoj

Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio

(Dua eldono)

formato: 9 × 14.5 cm., 40p.

prezo: £ 0.04 US\$ 0.10 Enoj 40.00 Gld. 0.40

Historiaj Restaĵoj Elterigitaj en Ĉinio(2)

(ilustritaj poŝtkartoj)

12 pecoj

prezo: £ 0.08 US\$ 0.18 Enoj 80.00 Gld. 0.75

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas: Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo

(P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio)

Mendeblaj ankaŭ ĉe la perantoj de El Popola Ĉinio

Sur la Kovrilo:

Gesportistetoj de la tri kontinentoj subskribas unu por alia.

Sur la Dorskovrilo:

Aklamo per kanto kaj danco al la venka inaŭguro de la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio, Afriko kaj Latinameriko



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 11 (184) 1973


Ĉefa Enhavo

Kombino de teorio kun praktiko en instruado	1
Ili progresas kaj politike kaj teknike	6
Tri studentoj	9
Sekretario Hing Jinglun	12
Vizito al la produkta brigado Jangkiaŭpan	14
Prospektorado sur Hongŝan-monto	17
Rakonto pri mar-karaso	20
Grandioza kunveno de solidareco kaj amikeco	21
Nia vizito al Japanio	27
Esperantaj novaĵoj	30
Kamboĝo en batalo	31
Novaj scienc-edukaj filmoj	34
Sala-nacio	35
Jihetuan-movado	36



Argenta Pilketo

kaj Amikeco



La podio en la inaŭguro de la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio, Afriko kaj Latinameriko



Gvidantoj de nia ŝtato Dong Bivuo, aganta prezidento, kaj Ĝu De, prezidento de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, salutas la sportistojn de la tablotenisaj delegacioj kaj aliajn gastojn venintajn el diversaj landoj kaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko.





Gvidantoj de nia ŝtato Ĝou Enlaj kaj Vang Hongven manpremas kun gastoj kaj sportistoj partoprenantaj en TAITAAL el diversaj landoj kaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko.



La geamikoj venintaj el Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj amasoj de Pekino en maro de amikeco




Kamboĝaj kaj palestinaj sportistoj en konkursejo

Iu laboristino de la Pekina Lana Ŝpinejo diris al la gastoj, "La popoloj de Ĉinio kaj Etiopio estas amikoj", kiam membroj de la Etiopia Tablotenisa Delegacio vizitis la fabrikon.

Sudvjetnamaj sportistinoj interbabilas kun ĉinaj sportistinoj kun profunda batala amikeco.

Ĝenerala supervidanto de la Japana Tablotenisa Delegacio Takeŝi Mori kaj sportistoj de Kolombio kune studas pri la elasteco de kaŭĉuka membrano de batilo.





Malia sportistino el okcidenta Afriko subskribas por iraka sportistino.



Srilankaj kaj kostarikaj sportistoj man-en-manee eniras la konkursejon.



Irana kaj kamboĝa sportistoj varme brakumas unu la alian post konkurso.

Cipraj amikoj kun pekinaj infanoj en amuza kunveno en parko



Roy Evans (*meze*), prezidanto de la Internacia Tablotenisa Federacio, A. K. Vint (*maldekstre*), honora ĝenerala sekretario de ITF, kaj ĉina sportisto Hi Enting en la amuza kunveno en Ĝongŝan-parko



Argentina veterana sportistino Olga Dina Noemi Carreira, kiu havas sperton de 31-jara tablotenisa ludo, varme instruas junan sportistinon de Ĉinio.



Respondeculoj de la Organiza Komitato de TAITAAL donacas "amikecajn pokalojn" al ĉiuj delegacioj.

